

LA ONDA de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2009

8-9

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2009. №8-9 (178-179)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2009

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 450 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldon: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 650 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2009.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2009, №8-9 (178-179).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 17 августа 2009 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Bjalistokaj fotoj



La Kongresa Sezono tradicie estas la ĉefa temo de la aŭgusta-septembra *Ondo*, kaj kelkaj pretaj tekstoj ne povis aperi en ĝi. Ankaŭ ĉi tiu kolumno, laŭplane destinita al redakcia komentario, estas dediĉita al la Kongresa Sezono per fotoj de Andrzej Sochacki. Legu pli en la internaj paĝoj.

Sur la kovrilpaĝo vi vidas patroprenantojn el diversaj landoj (Koreio, Togolando, Ukrainio, Vjetnamio, Usono) en la kultur-lingva festivalo en la 65a Internacia Junulara Kongreso en Liberec. (*Fotis Alisa Nikitina*)

Mirinda kongreso en la naskiĝurbo de Zamenhof

La 94a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko klare superis la averaĝan UK-on, aŭ eĉ pli, aŭdeblis opinioj ke ĝi estis mirinda. Vi povas nur bedaŭri, se vi ne partoprenis, kaj la nombro de aliĝintoj ne estis aparte impona, nur 1860.

La kondiĉoj por la sukceso ja estis klaraj: la urbestro Tadeusz Truskolaski subtenis la organizadon de la kongreso kaj mem partoprenis kaj la inaŭguron kaj fermon. La vicurbestro Aleksander Sosna estis prezidanto de la LKK. Esperantaj flagetoj svingis en la urbo apud flagetoj polaj kaj regionaj. La urbo komprenis, ke eventuale Esperanto estas ĝuste tio, kion Bjalistoko povas oferti al la mondo, kaj ĝi ekuzis tiun eblecon. Bone aranĝita profesia Zamenhof-centro, muzeo pri Zamenhof, estis malfermita ĵus antaŭ la kongreso, kaj turismaj informiloj diversloke informis pri Esperanto-rilataj vidindaĵoj pole, Esperante kaj angle. Kaj ne nur pri Esperantaj, sed ankaŭ pri aliaj objektoj, kiuj rilatas al la plurkultura karaktero de la urbo.

La nacia kultura programo estis aparte riĉa. Parte tio sekvis el kombino al la kongresa programo de pluraj programeroj de la Podlaĥia Oktavo de Kulturoj, kiu okazis samtempe en la urbo.

La kutima unulinia lokindiko “aliloke”, do ekster la kongresejo, prenis dum pluraj kongresaj tagoj eĉ tri liniojn en la taga programo. Teatraĵoj Esperantaj okazis ankaŭ en urbaj teatroj, kio kaŭzis plendon en la komitata kunsido, sed aliflanke la praktiko estis ankaŭ defendinda, ĉar ĝi donis al Esperanta teatro verajn kondiĉojn por prezenti. Inter la plej brilaj koncertoj estis loka *Chanajki Klezmer Band*. Ankaŭ Esperanta kultura programo estis ne malpli riĉa, kaj parto el ĝi estis ankaŭ malferma por ekstera publiko.

Profesiigo de la kultura programo videblis en tio, ke la Internacia arta vespero enhavis nur antaŭe selektitajn programerojn, dum kongresaj artistoj, kiuj volis prezenti sian arton estis lokitaj al Arta kafejo ie en la urbo. Kaj la himnon en la fermo helpis kunkanti ne Internacia Koruso sed Bjalistoka Kanto-Studio, junulara grupo kiu prezentis ankaŭ aliajn kantojn en Esperanto.

Krom kulturaj ankaŭ la klerigaj programeroj kolektis vastan publikon. Ne nur kleriga lundo, sed ankaŭ Esperantologia Konferenco kaj IKU-prelegoj havis certe averaĝe pli da partoprenantoj ol ekzemple komitatkunsidoj (des pli se ne kalkuli komitatanojn). Eĉ la programeroj “Estraro respondas” kaj



“Centra Oficejo respondas” estis ĉi-jare malpli popularaj kaj certe malpli kritikaj. Oficistoj kaj estraro ricevis ankaŭ laŭdojn kaj eĉ la kutimaj plendoj estis malpli akre formulitaj.

Kvankam jubilea pri Zamenhof (do, pasinteco) la kongreso rigardis ankaŭ antaŭen: ne nur rememoroj kaj historiaj rakontoj, sed provoj ligi Zamenhof-on kaj lian idearon al la nuntempo. Unu el la ĉeftemoj estis senmitigo de Zamenhof, kiun multaj prelegantoj klare faris. Al estonteco rigardis ankaŭ intervjuoj de eminentuloj pri Esperanto ĝis 2059, kiuj aperis en la *Kongresa kuriero* (legebla en la reto).

La salono Zamenhof estis simple tendo, eventuale la unuan fojon en la historio de la Universalaj Kongresoj. Nu, la tendo ja servis akceptebla, eventuale la etoso tie estis pli bona ol en sporta halo iam pli frue. Tamen la sunaj tagoj devigis fari programŝanĝojn; ekzemple, filmoprezento estis lokita de tago al vespero pro lumaj kondiĉoj.

La apuda biertendo bone regalas la kongresanojn per biero kaj manĝaĵoj, kvankam la manĝoservo estis informita nur sabate, ke multaj esperantistoj estas vegetaranoj. La kutimaj pladoj estis kolbaso kaj viandaĵo, kun frititaj terpomoj kaj kukumo, sed riceveblis ankaŭ salatoj kaj aliaj vegetaraĵoj. Biertendo estis ankaŭ ekster la formala kongresejo kaj tio ebligis al vizitantoj facile sekvi la kongreson.

Se la vetero estus pli pluva, eventuale aperus pli da problemoj pro la fakto, ke necesis daŭre iri eksteren por veni de unua parto de la konstruaĵo de la teknika altlernejo al alia. Kaj pro tio eble kelkaj programeroj perdis partoprenantojn.

Novtipaj ekzamenoj en Bjalistoko

En la 94a Universala Kongreso okazis, unuafoje kadre de UK, Esperanto-ekzamenoj laŭ la nova ekzamensistemo de UEA, konforma al la Eŭropa Referenckadro. Pli frue jam kvardeko da esperantistoj ricevis diplomon laŭ tiu sistemo de la Konsilio de Eŭropo, kies Esperanto-version oficiale UEA sola provizas pere de sia kontrakto kun la Lingvoekzamena Centro (ITK) de la prestiĝa universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto.

En Bjalistoko ekzameniĝis je tri niveloj entute 47 personoj el 20 landoj, inter kiuj elstaris Francio kun dek, kaj Brazilo kaj Germanio kun po kvin kandidatoj. La plej populara nivelo estis C1 (supera), kiun trapasis 23 kandidatoj. La skriba parto de la ekzamenoj okazis en ĵaŭdo (30 jul). Pri la parolaj ekzamenoj du komisionoj, konsistantaj el ok membroj, laboris plenergie en ĵaŭdo kaj vendredo (30–31 jul). La sukcesintoj ricevos oficialan diplomon, asignitan kaj registritan en ITK en Budapeŝto.

Paralele okazis ankaŭ trejnado de ekzamenantoj, dum kiu sep novaj kolegoj kune kun pli frue trejnitaj ekzamenantoj partoprenis 8-horan kurson kaj observis poste la parolajn sesiojn. Ekde nun dudeko de ekzamenantoj pretas okazigi sesiojn lige kun grandaj Esperanto-aranĝoj. La sekvaj ŝancoj por ekzameniĝi laŭ la Referenckadro estos dum ARKONES en Poznano (18–20 sep) kaj dum la tradiciaj jarfinaj aranĝoj en Germanio. Interesitoj bv. kontakti Katalin Kováts, katalin@ikso.net.

GK UEA



La urbestro de Bjalistoko, Tadeusz Truskolaski kelkfoje vizitis la kongreson kaj akceptis kongresanojn en la palaco de Branicki kaj alparolis ilin en preskaŭ senerara Esperanto. (Fotis Andrzej Sochacki)

Rezolucio de la 94a Universala Kongreso de Esperanto

La 94a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Bjalistoko de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2009, kun partopreno de preskaŭ 2000 homoj el 63 landoj en la jaro de la 150a datreveno de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto, Lazar Ludwik Zamenhof, kaj samtempe en la Internacia Jaro de Akordiĝo proklamita de Unuiĝintaj Nacioj,

diskutinte la kongresan temon “Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ”, kaj studinte kun aparta atento la vivon kaj verkojn de Zamenhof,

notinte la fakton, ke la urbo kaj regiono de Bjalistoko pli kaj pli rekonas la escepte gravan rolon, kiun Zamenhof ludis kaj daŭre ludas kiel monde rekonata figuro en la morala evoluo de la homaro,

konsciante, ke tiu rekono konkretiĝis interalie en la malfermo de Centro Zamenhof fare de la urbaj aŭtoritatoj de Bjalistoko, kaj en propono, ke la Bjalistoka Universitato ricevu la nomon Zamenhof;

memorigante, ke okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Lazar Ludwik Zamenhof Unesko rekonis lin kiel unu el la grandaj personecoj de la mondo, kaj ke tra la jaroj venis multaj similaj rekonaj pri la meritoj de Zamenhof kiel granda monda pensulo,

kaj **gratulante** Unuiĝintajn Naciojn pro ĝiaj iniciatoj rilate al la ideo de akordiĝo, tiel esenca en mondo kiun dividas malakordoj pro antaŭjuĝoj kaj manko de toleremo,

konstatas, ke

1. Per la internacia lingvo Esperanto, Zamenhof kreis unike efikan ilon de internacia komunikado sur neŭtrala bazo, sen favori unu popolon super alia, kaj sen favori unu etnan lingvon super alia, kaj ke tra pli ol 120 jaroj da uzado Esperanto pruvis sian taŭgecon kiel internacia lingvo plene adaptebla kaj adaptita al ĉiuj komunikaj bezonoj.

2. Tamen, Zamenhof samtempe komprenis, ke lingvo estas kolektiva posedaĵo, kaj konfidis la evoluon de sia lingvo al ties komunumo de uzantoj, tiel ke Esperanto kaj ĝia kulturo fariĝis esence kreaĵo kolektiva, kiu evoluis en spirito de lingva demokrateco.

3. Tion farante, Zamenhof ankaŭ rekonis, ke utiligo de neŭtrala lingvo en la internaciaj rilatoj helpus konservi lokajn kaj regionajn lingvojn kaj kulturojn kaj la identecon de ties komunumoj.

4. Zamenhof ankaŭ signife kontribuis, per siaj verkoj kaj agoj, al klopodoj forigi la malamikecon inter la anoj de la diversaj religioj, al forigo de rasaj antaŭjuĝoj, kaj al rifuzo de milito kiel akceptebla maniero solvi disputojn — valoroj same gravaj en la nuna epoko kiel en la epoko de Zamenhof.

5. Sekve, Zamenhof plene meritas pli da atento ne nur kiel kreinto de lingvo sed kiel persono, kiu strebis al aŭtenta frateco inter la homoj surbaze de plena kaj reciproka kompreniĝo.

6. Tia frateco povas veni nur kiam la homoj interkompreniĝas en reciproka respekto — procedo, en kiu Esperanto povas ludi kaj jam ludas unikan rolon.

7. Interkompreniĝo estas esenca paŝo al tiu profunda kaj daŭra akordiĝo, kiu estas la celata idealo de la Internacia Jaro de Akordiĝo.

8. Akordiĝo eblas nur en situacio, en kiu lingvaj diferencoj ne formas baron al egalca dialogo.

9. En tiu senco Esperanto estas unike taŭga kiel bazo por daŭra akordiĝo, kaj Universala Esperanto-Asocio, per sia atento ankaŭ al moralaj valoroj kaj al respekto de homaj rajtoj, povas signife roli en plenumo de la celoj de la Internacia Jaro de Akordiĝo.

Komento aŭdita en biertendo difinis, ke la libroservo estas en la fino de la mondo (eble 300-paŝa distanco). Ekstere eble la distanco sentebli pli longa.

Ankaŭ alia nekutima solvo estis salono Hodler, kie kunsidis la komitato de UEA. Ne eblis ronda tablo, sed komitatanoj sidis en ordinara legosalono, kaj la publiko miksiĝis inter komitatanoj. La malpli facila foriro tamen eble iom pli disciplinigi komitatanojn, kiuj ne povis vagi tien kaj reen.

La urbo ricevis bonan reeĥon al sia atento pri Esperanto. Alia demando estas: ĉu la atento daŭras. La fondo de Zamenhof-centro, ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pli plurkultureco, kvankam la nuna ekspozicio temas nur pri Esperanto, estas unu el pozitivaj signoj. Esper-eble okazus kulturaj festivaloj pri Esperanto, aŭ indus inkluzivigi Esperantan parton al ĝeneralaj kulturaj eventoj de la urbo. Eble ili jam okazis, sed necesus pli reklami ilin kaj la urbon por ke esperantistoj daŭre vizitu ĝin. Bona ekzemplo pri la kontribuo de Esperanto al loka kulturo estis koncerto de JoMo en urba parko. JoMo ja scipovas la polan, kaj grandparte la komunikado kun la publiko, pli ol duone loka, okazis en la pola.

La ideo ligi Esperanton al plurkultureco estas laŭdinda, sed aliflanke ĝi ne restis sen sekvoj: lokaj naciistoj atakis eĉ esperantistojn (ŝtono estis ĵetita al amasloĝejo, pneŭmatikoj de esperantistaj aŭtoj malplenigitaj), kaj en la lasta vespero iu farbis la monumenton de Zamenhof per bruna koloro. Fajrobrigado tuj alvenis, kaj post kelkaj horoj nenio plu rimarkeblis.

Tamen necesas diri, ke ĝenerale la etoso en la urbo estis amika kaj akceptema kaj ordinara kongresano apenaŭ vidis ion kontraŭesperantan. Mi neniam timis piediri al hotelo eĉ malfrue vespere kun kongresa insigno ĉebruste, kaj foje tio eĉ kaŭzis pozitivajn reagojn, pli ol iam antaŭe aliloke. Eventuale la agoj kontraŭ Esperanto, pri kiuj raportis ankaŭ loka gazeto, portis eĉ kroman renomon al Esperanto: ĝi ne estas iu sendanĝera hobbio, pri kiu neniu atentus, sed io serioza, kion iuj ekstremistoj eĉ kontraŭas, kaj sekve, io atentinda kaj eĉ lerninda.

Jukka Pietiläinen

Junulara kongreso en Liberec'

Se iu estas samtempe juna, blindulo, maldekstrulo, kulturaganto, kristano kaj instruisto de Esperanto, tiu ĉi-jare havis aparte malfacilan taskon decidante kiun someran aranĝon partopreni antaŭ la Bjalistoka UK. Kvankam multaj junaj esperantistoj aktivis samtempe ankaŭ en iuj el la menciitaj kampoj, entute 343 da ili elektis pasigi la semajnon de la 18a ĝis la 25a de julio en Ĉeĥio kie okazis la 65a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Eble kelkaj bazis sian decidon ankaŭ sur la fakto, ke ĉi-jare simple ne eblis maltrafi la kongresurbon — sufiĉis ja memori la aktualan kongresan temon — kiu estis Liberec' (intence literumita kun apostrofo) — por retrovi sur la mapo 100 km norde de Prago la kvinan plej grandan urbon de Ĉeĥio, kiu ne hazarde nomiĝas same — Liberec.

Unuafoje en la sepdekdujara historio de la IJK ĝin gastigis Ĉeĥ(oslovakio), sed pro la konvena geografia situo de la kongresurbo (proksime de la trilandlimo Ĉeĥio-Germanio-Pollando) la kongreson organizis ne nur la Ĉeĥa Esperanto-Junularo, sed ankaŭ junaj esperantistoj el Germanio kaj Pollando.

La antaŭnelonga plivastiĝo de la Ŝengen-spaco ebligis plifacilan moviĝon de la partoprenantoj, sed ankaŭ malhelpis akiradon de vizoj ekzemple al multnombraj ruslandanoj. Tamen alvenis partoprenantoj el entute 41 landoj.

Kiel kongresejo servis studenthejmo de la tehniko universitato. La taga programo konsistis el temaj (pri libereco), movadaj kaj distraj programoj, kadre de kiuj oni ekzemple povis diskuti pri lingva libereco, aŭskulti prelegon pri mona libereco aŭ kleriĝi pri libera programaro, sed ankaŭ informiĝi pri la iniciatoj kiel Herzberg aŭ Lingvolanĉilo, aŭskulti prelegon de brazila esperantisto

La nova Estraro de TEJO

Kiel prezidanto estis reelektita Gregor Hinker el Aŭstrio. Paulína Kožuchová el Slovakio fariĝis ĝenerala sekretario kaj Sergeo Tyrin el Israelo kasisto. Saša Kovjazina el Ukrainio respondecos pri informado, Łukaŝ Žebrowski el Pollando pri IJK kaj kongresoj, kaj Irmina Szustak el Pollando pri landa agado. Kvar el la ses estraranoj estas novaj; nur Hinker kaj Tyrin oficis ankaŭ en la antaŭa periodo.

GK UEA



pri Francisko Valdomiro Lorenz aŭ lerni pri la novaj atingoj de E@I. Ne mankis okazoj konatiĝi pli profunde kun la kongreslando, ekzemple, per prelego pri la ĉeĥa biero (kadre de ligita ekskurso kun biergustumado). Kunlabore kun UEA estis aranĝita novtipa ekzamensesio pri Esperanto laŭ la eŭropa referencokadro.

Tamen la pezopunkto de junularaj aranĝoj tradicie ne estas tiom la taga kio la vespera kaj nokta programoj. Ĉiuvespere la kongresanoj kuniĝis por partopreni koncerton, spekti skeĉojn aŭ alian artan programon. Proksima kulturcentro estis loko de la solenaj malfermo kaj fermo, kadre de kiuj sin prezentis internacie fama infana koruso *Severáček* kaj legiĝis salutmesaĝoj de patronoj kaj aliaj eminentuloj (la kongreson aŭspiciis prezidantoj de ambaŭ ĉambroj de la ĉeĥa parlamento, eksĉefministro Mirek Topolánek, ĉeĥa kardinalo Miloslav Vlk kaj reprezentantoj de la regiono, la kongresurbo kaj eĉ urbestro de ties germana ĝemela urbo Augsburg). Koncertis la multe ŝatataj JoMo kaj Kim Henriksen (sur tegmento de la oketaĝa kongresejo dum sunsubiro), sed prezentiĝis ankaŭ la nova rep-stelo Tone, la brazila rokgrupo *Supernova*, kaj la ĉeĥa junulara muzikgrupo PECH. La vesperan programon ĉiam sekvis programo nokta, kiu ofte daŭris ĝis la matenaj horoj, kaj proponis diskejon, drinkejon (por trinki kunalkohole en bruo), gufujon (por trinki senalkohole en malbruo) kaj filmejon.

Aparte riĉa estis tiu ĉi IJK je eksteraj eventoj. Ekde aprilo aperigadis regiona gazeto ĉiusemajnan serion de artikoletoj pri Esperanto kaj dum la kongreso aperis pluraj mencioj en gazetoj kaj interreto, sed plurfoje raportis pri ĝi ankaŭ tutlanda radio, kaj la IJK sukcesis eniri eĉ la novaĵservon de la ĉefa ĉeĥa informagentejo ČTK. Plej grandan sukceson oni

tamen atingis, kongrue kun la planita translima informstrategio, pere de la televido ARD el Germanio, kies skipo surloke filmis kaj sekve pretigis triminutan raporton preskaŭ komplete en Esperanto (kun germanaj subtekstoj). Krom la fenomeno Esperanto mem, la amaskomunikiloj raportis pri la sankta meso celebrata en Esperanto de la praga kardinalo Miloslav Vlk (kiu mem junaĝe aktive uzis Esperanton), pri la koncerto de JoMo en kiu li sur la ĉefa placo de Liberec kantis en 19 lingvoj, aŭ pri la kulturlingva festivalo per kiu en budoj per lingvaĵoj, geografiaĵoj, vestaĵoj, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj prezentis sin la reprezentataj landoj.

La IJK-n organizas pere de siaj landaj sekcioj TEJO, kaj okaze de IJK ĉiam kunvenas ĝia komitato. Ĉi-jare ĝi traktis interalie aliĝpetojn de du novaj asocioj (Benino kaj Meksiko), starigon de komisiono por esplori eblojn de IJK en Afriko, lanĉon de la nova interreta versio de Pasporta Servo, kaj elektis novan estraron por 2009–2011.

Rimarkinde estas, ke ĉiuj novelektitaj estraranoj estas membroj de la programteamo de la libereca IJK. Ilia tasko estos ankaŭ kunordigi la okazigon de la venontjara IJK, kiu okazos tuj post la UK en Havano, ankaŭ en Kubo. Inter siaj lastaj agoj, la komitatkunveno aprobis kongresan rezolucion, en kiu la junuloj defendas la rajton de ĉiu unuopulo elekti sia(j)n propra(j)n identeco(j)n. Ĝi estas adresita al la prezidento de Ĉeĥio Václav Klaus kiel reago al lia malfavora rimarko ke “Eŭropismo estas kiel Esperanto — same artefarita kaj morta”.

Marek Blahuš

Liberec: Instruado de ludo je afrika muzikinstrumento (Fotis Andreas Münchow)



Prezidento Lula pri Esperanto

En junio la Prezidanto de UEA Probal Dasgupta sendis leteron al la brazila, ĉinia kaj ruslanda ŝtatestroj kaj al la barata ĉefministro, kiuj kunvenis kelkajn tagojn pli frue por diskuti pri la monda ekonomia krizo kaj pri pli intensa kunlaboro inter siaj landoj ĝenerale. La gvidantoj de la kvar “promesaj landoj por la estonteco”, laŭ la karakterizo de Dasgupta, diskutis interalie pri kreo de nova valuta sistemo. En sia letero la Prezidanto de UEA atentigis ilin ankaŭ pri la bezono de nova lingva sistemo, kiu ne privilegiu kelkajn landojn, kaj pri Esperanto kiel la lingvo, kiu ebligis ĝin.

Intertempe Dasgupta ricevis la suban respondon komisiitan de la brazila prezidento Luiz Inácio Lula da Silva:

Prezidento Luiz Inácio Lula da Silva taskis nin respondi vian leteron de la 20a de junio 2009 adresitan al li, por danki pro via zorgo pri la egaleco en internaciaj rilatoj, tiel en la financa kiel en la lingvaj aspektoj.

Ni ŝatus montri al vi nian admiron pro la klopodo, kiun esperantistoj de la tuta mondo entreprenas cele al la disvastigo ĉiam pli granda de Esperanto, lingvo kreita de doktoro Lazaro Zamenhof kiel kontribuado por la interkompreno kaj komprenemo inter la homoj.

Ni scias, ke en la historio de la homaro, estis lingvoj, kiuj entrudiĝis kiel sekvo de la politika hegemonio, kiel latino, aŭ certagrade la franca kaj poste la angla. Ni deziregas ke, fakte, iun tagon Esperanto povu esti akceptita de plejparto de la nacioj kiel lingvo adoptita por faciligi la komunikadon sen lingvaj privilegioj.

Ni certas, ke Universala Esperanto-Asocio daŭrigos siajn demarŝojn ĉe Unuiĝintaj Nacioj por laŭgrade pligravigi la rolon de Esperanto kiel internacia lingvo. Sekve ni ne vidas necesa pri diskuti la aferon, ĉar ni konsentas pri la valoro de la lingvo disvastigata de via asocio.

Sincere,

Cláudio Soares Rocha

Direktoro pri Historia Dokumentado
GK UEA

Esperanto en la profesia agado

12–15 jun en Karlovo (Bulgario) laboris la unua Internacia Seminario “Apliko de Esperanto en la profesia agado”, kunorganizita de AIS-Bulgario, Bulgara E-Asocio, Internacia Universi-



Prezidento Lula deziras komunikadon sen lingvaj privilegioj.

tato Karlovo kaj la Regiona Estraro de la Bulgara Scienc-teknika Asocio. Krom esperantistoj partoprenis ankaŭ bulgaraj fakuloj, kiuj prelegis kaj partoprenis la diskutojn ĉar estis rekta traduko Esperanta-bulgara-Esperanta.

La Seminarion partoprenis fakuloj el 11 landoj. Salutmesaĝon sendis Zaharieva, vicministro de kulturo en Bulgario. Bulgara Akademio de la Sciencoj sendis sian oficialan reprezentanton partopreni, prof. Lilia Krumova-Cvetkova, kiu ne nur tralegis la salutmesaĝon de la Akademia Estraro, sed mem aktive partoprenis la Seminarion, prelegante kaj partoprenante la diskutojn.

Sabate kaj dimanĉe estis prelegoj kaj diskutoj en la Internacia Universitato Karlovo. Krom prof. Lilia Krumova-Cvetkova, prelegis, interalie, prof. Hans-Dietrich Quednau, prof. Christer Kiselman, prof. Alicja Lewanderska-Quednau, prof. Eva Polaková, prof. Bojidar Leonov kaj aliaj profesoroj, docentoj kaj fakuloj.

Pri la Seminario interesiĝis diversaj oficialaj instancoj en Bulgario, radio, TV kaj gazetaro. Krom la ĉiutagaj informoj estis du gazetaraj konferencoj kaj prof. Leonov estis invitita en Plovdivo partopreni rektan TV-programon de la ŝtata televido, kie dum 20 minutoj li respondis demandojn pri la temo “La internacia Esperanto-movado en la komenco de la 21a jarcento”.

La Seminario demonstris, ke Esperanto estas ne nur komuna lingvo por babilado, amuzo kaj kontaktoj inter la esperantistoj, sed ĝi povas kaj devas esti oficiala lingvo por kontaktoj kaj kunlaboro en diversaj sciencaj kaj profesiaj fakaj seminarioj.

AIS-Bulgario

En la urbo de Solidareco

Gdansko, la urbo de la legenda sindikato *Solidareco*, tuj post la Bjalistoka UK gastigis renkontiĝon, en kiu partoprenis multaj pollandaj kaj dudeko da alilandaj esperantistoj.

La plej grava parto de ĉi tiu postkongresa renkontiĝo estis la Tago de Esperanto kadre de la somera programo de la urbo kaj en la programo de la Dominikana Foiro.

Al la bonveniga lunĉo de la Tago venis Honora Gasto — la prezidanto de la supera ĉambro de la Pollanda Parlamento, Bogdan Borusewicz, iama ĉeforganizinto de Ŝipfareja Striko en aŭgusto 1980.

Lecionon de Esperanto por publiko sukcese gvidis Małgorzata Zięba-Szmaglińska, profesia lingvoinstruanto.

La Esperanto-koncerto sur la ĉefa placo en malnova urbo havis grandan publikon. Unue kantis Mikaelo Bronŝtejn, kaj poste Ĵomart kaj Nataŝa, kies diskojn post la koncerto aktive aĉetis polaj kaj eksterlandaj aŭskultintoj. Antaŭ la koncerto estis aranĝita surstrata “happening” sur stilzoj kun grandaj Esperanto-flagoj, por logi publikon.

La cetera programo celis nur esperantistojn, kiuj bone interkonatiĝis dum la renkontiĝo. La unuan fojon en la urba historio, internacia grupo de esperantistoj metis florkronon sur la placo de Solidareco ĉe la monumento de la ŝipfarejaj laboristoj pereintaj en 1970.

Sukcesis pikniko, kun ĉampano de la urbestro, okaze de la 50-jariĝo de la replantado de la Esperanto-Kverko en Sopot. La ĉeestantaj partoprenintoj de la 15a IJK en Gdansko (1959) estis ornamitaj per floraj girlandoj.

Ĉio finiĝis en gaja etoso vespere la 4an de aŭgusto sur galeono LEW.

Kiel memoro restis la *Verda Koko*, kiun en venontaj jaroj oni povos foti en Gdansko dum Dominikana Foiro. Ni esperas, ke parto de turistoj, kiuj dum la Tago de Esperanto vizitis Gdanskon, vidis ke Esperanto vivas, kaj reveninte hejmen ili serĉos eblon lerni la lingvon.

Jagoda Greger



SAT: Migri senlandlime

Kun 70 partoprenantoj, la 82 Kongreso de SAT deruliĝis en Milano 18–25 jul 2009. Ĝin organizis ARCI Esperanto, unu el laboristaj Esperanto-asocioj ligitaj kun SAT, kiuj agadas en unuopaj landoj aŭ lingvoregionoj. ARCI Esperanto estas samtempe branĉo de ARCI — Associazione Ricreativa e Culturale Italiana (Itala Kultura kaj Distra Asocio). Membras en ARCI ĉirkaŭ 1.150.000 personoj, dividitaj en ĉirkaŭ 6000 lokaj grupoj. La kongreso multe kontribuis al la firmigo de rilatoj inter SAT kaj ARCI per reciproka agnosko de la sinkompletigaj diversaj ecoj kaj de komuna sennacieca agadspirito de la du asocioj, el kio rezultos, laŭ diversaj dumkongresaj diskutoj, kelkaj interesaj kunlaboroj. ARCI siavice organizis kelkajn distrajn partojn de la kultura-kleriga programo de la kongreso.

Al tiu kleriga programo apartenis ankaŭ prelegoj pri la sinteno de Gramsci al Esperanto, nekonataj esperantlingvaj verkistoj de Ukrainio, klasbataloj en Usono, etikaj bankoj, forumoj pri Latinameriko, Mezoriento kaj Malagasio. Anna Löwenstein prezentis sian historian romanon en Esperanto *Morto de artisto*. Inter la distraj vesperaj aranĝoj estis koncertoj de *la Vojirantoj* kaj *Rêverie*, kiuj trafe ilustris la tre aktualan temon de la Kongreso: “Migri senlandlime, vivi sennaciece”, memorigante al la kongresanoj la migrad-malhelpan politikon de Italio kaj de multaj aliaj mondpartoj, en mondo, kies vivkondiĉoj iĝas pli kaj pli malfacilaj.

SAT klopodas funkcii kiom eble bazdemokratiece. Pro tio signifan parton de la tempo kaj energio de la kongresanoj okupas kvar matenaj ĝeneralaj membrokunvenoj, en kiuj membroj informiĝas kaj sin esprimas pri ĉiuj aspektoj de la asocia agado kaj prezentas demandojn kaj donas komisionojn al la Plenum-Komitato, la supera decidorgano.

Por kelkaj subgrupoj de SAT, respektive organizaĵoj ligitaj kun SAT, la SAT-kongreso prezentas oportunan okazon por ĉiujara membrokunveno. Tiel kunvenis ARCI Esperanto, kaj ankaŭ la Pacista, la Komunista, la Liberecana kaj la Sennaciista Frakcioj de SAT. La Pacista Frakcio agadas favore al la Konvencio de Oslo kontraŭ la pafaĵojetoj el bomboj, instigante al intervenado, por ke kiel eble plej multaj ŝtatoj subskribu kaj ratifu tiun konvencion. Membroj de la Komunista Frakcio kunvenis ĉi-foje kun Alessandro Rizzo,



SAT-anoj en Milano (Fotis Jakvo Sviram)

opozicia kvartalkonsiliano kaj membro de la partio “Demokrata Maldekstro”. Ĉe la sennaciistoj temas pri anoj de ideofluo, kiu ampleksas universalismon, radikalajn kontraŭnaciismon, kaj praktikan utiligon de Esperanto kiel instrumento de edukado al eksternacia pensado.

Unu el la kulminaj punktoj de la kongreso estis podia diskuto inter Probal Dasgupta, la prezidanto de UEA, kaj Jakvo Schram, prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT. Ĝi helpis prilumi la malsaman aliron de la du asocioj al Esperanto: dum UEA unuavice propagas Esperanton tra la mondo, SAT esence uzas ĝin por siaj celoj (laŭ la statuta difino “klasbatalaj”, kvankam estas periode floranta debato pri tio, ĉu tiu difino plu sufiĉas aŭ taŭgas). Novaĵo estas, ke la UEA-prezidanto ekdevis de la ĝis nun jen kaj jen rimarkebla tendenco en UEA ĉirkaŭpreni kaj eĉ voli enkorpiĝi en si SAT. Dasgupta alvokis SAT “esti SAT”, kompreninte ĝian specifan ne-Esperantomovadan rolon.

Malgraŭ la bonega etoso la ĉeestantaj SAT-membroj ne havis la eblon forgesi pri unu problemoj, kiu pensigas la asocion de kelkaj jaroj: malaltiĝanta membronombro: 70 partoprenantoj estas multe malpli ol en la pasintaj jardekoj. Kialoj de tia situacio estas diversaj kaj ankoraŭ ne ĝisfunde esploritaj, sed tamen konstatablas ankaŭ revigliĝo de la ĝenerala etoso interna, kaj disfloras novaj projektoj, inter kiuj elstaras la atingoj de la Eldona Fako Kooperativa de SAT, kiu ĉi-jare eldonis du gravajn klerigajn verkojn aparte aktualtemajn: *Kompendio de la Kapitalo* de Carlo Cafiero kaj *Plano B* de Lester R. Brown. La estonteco de SAT aspektas sufiĉe promesoplena, des pli ke la labo-

ro farota estas granda en la streĉiĝanta tutmonda situacio: la lastatempe kreskinta memkonscio de SAT kune kun reemfazo de ĝiaj originaj celoj kreis etoson, en kiu ĝi ideo pli malkatenas sin de la Esperanto-movado.

Montriĝas, ke kelkaj tradiciaj ecoj kaj motivoj de SAT bone agordiĝas kun kelkaj nun populariĝantaj maldekstraj agadformoj kaj motivoj:

— preteco de diversaj partie organizitaj tendencoj nedogmeme kaj malsekteme rilati inter si,

— retforma, bazdemokratie organizita kunlaboro de la diverstendencanoj, kaj

— kontraŭnaciismo, kiu poiome — apud aferoj kiel kontraŭrasismo kaj kontraŭseksismo — estiĝas unu el la kolonoj de maldekstra agado, tia, kia ĝi estis ekde la unua tago en SAT.

Laŭ gazetartikolo pretigita de la Proponkomisiono de la 82a SAT-Kongreso

En la Brazilia parlamento

19 jun 2009, de la 9h30 ĝis 12h00 okazis en la brazila parlamentejo tutlanda videokonferenco pri la temo “Lingvaj Baroj kaj Esperanto”. Partoprenis senatano Cristóvam Buarque, prezidanto de Brazilia Esperanto-Ligo José Passini, prof. Paulo Nascentes. Homoj en la tuta lando akompanis la eventon kaj kelkaj aktive intervenis; 29 Esperantistoj persone ĉeestis. La senatano diris: “Estas tre grave, ke Esperantistoj skribu al senatanoj por peti apogon al la PLS №27 de 2008, kiu ŝanĝas la Leĝon №9394 de 20 dec 1996, por starigi elektoblan enkondukon de instruado de Esperanto en mezgradaj lernejoj”.

Laŭ BEL Informas



SES: Diplomitaj de la 3a grupo kun instruistino Petra Smideliusz (*Fotis Peter Novotniček*)

IKBE en komforta etoso

La 75a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) sukcese okazis 18–24 jul 2009 en la ripozloko Muszyna situanta en la pitoreska montara regiono Sonča tero (suda Pollando).

Ĉirkaŭ cent kongresanoj, venintaj el 16 landoj, ĝuis freŝan puran aeron kaj varman (iam eĉ tro) veteron. La kongreso estis organizita sub aŭspicio de Pollanda asocio de nevidantoj en ĝia rehabilititejo *Nestor*. La organizantoj aranĝis riĉan kulturen kaj ekskursan programon: koncertoj de folkloro kolektivo kaj amatora blovorkestro, vizito al belega ripoz-kaj-kuracurbo Krynica kun gustumo de lokaj mineralakvoj, vojaĝo al mielproduktejo Kamianna kiu troviĝas en ekologie pura loko alte en montaro, flosado laŭ rivero Poprad ktp.

Dumtage okazis ankaŭ instruilecionoj kaj prelegoj; kaj tiuj kiuj ne laciĝis pro la abunda programo preskaŭ ĉiuvespere havis eblecon danci kun akompano de “viva” muziko. Okazis la tradiciaj interkona kaj arta vesperoj. Granda grupo de kongresanoj, veturanta post la fermo de IKBE al Bjalistoko por partopreni UK-on, vizitis laŭvoje faman salminejon Wieliczka, kie troviĝas subtera sala preĝejo, la sola en la mondo, kaj ĝuis ekskurson en antikvaj stratoj de Krakovo — iama ĉefurbo de Polujo.

Ĉiam dum la kongreso ni sentis amikan zorgon de la organizantoj, kiuj malgraŭ neeviteblaj malfacilaĵoj faris sian eblon por krei por ni komfortan etoson.

Nikolaj Penĉukov

Ankoraŭfoje Greziljono

La skipo de la Kastelo Greziljono perdiĝis dum la vintro en tedaj kaj sterilaj disputoj. Tamen Franjo Lévúque kaj Guy Martin kun subteno de parto de la novaj Komitatanoj akiris altan Eŭropan subvencio. Ve, vane! La plimulto rifuzis pro kialo, laŭ mi nesufiĉa, ke la kastelo ne estis taŭga. Kvazaŭ por pravigi ilin, tri tagojn post la rifuzo de tiu subvencio, la akvo- kaj parte hejto-sistemoj estis difektitaj de frosto. La asekuo ricevis misajn informojn kaj rifuzis pagi la riparon de la damaĝo.

Do, Greziljono glitis al deklivo malgraŭ la ŝatego, kiun multaj fidele esperantistoj konstante montras. En majo la ĝenerala asembleo konkludis, ke oni devus reorganizi la tuton.

Bedaŭrinde, pro tio tute ne organiziĝis la printempaj kaj someraj programoj, la asocioj ne estis informitaj, kaj ŝajnas, ke la skipo perdas la kontrolon pri la propra posedaĵo, almenaŭ se oni kredas kelkajn el ili.

Tamen, oni instigis du periodojn por staĝoj: du semajnojn en julio, kaj du en aŭgusto. En aŭgusto sub la gvido de D. Bertrand kaj P. Lagrange okazis staĝo kadre de la Monda Astronomia jaro. Kvankam estas malmultaj partoprenantoj, la etoso estas familia kaj tolerema. La staĝanoj vizitis Muzeon en Angers kaj gavis stelojn en apuda observatorio.

Kaj ni esperu, ke la vojo al renovigo de la Kulturdomo estu trovota en la lakta vojo de la steloj, eĉ se ne multaj verdaj.

Klod T.

SES: nova aranĝo kun nova defio

90 homoj de 23 landoj ĉeestis 10–18 jul 2009 en la Somera Esperanto-Studado (SES) en la urbo Modra, Slovakio.

La duan fojon dum ĝi okazis renkontiĝo de uzantoj de la retejo www.lernu.net. Proksimume duono da alvenintoj estas homoj, por kiuj SES estis entute unua Esperanto-aranĝo, ĉar plejmulto da partoprenintoj estas “virtualaj esperantistoj”, kiuj lernas Esperanton ĉefe per lernu.net, kaj kutime uzas ĝin nur interrete. Tamen SES pruvis, ke eblas venigi tiajn homojn al *real*a Esperanto-aranĝo, kaj ke eblas kaj indas “enmovadigi” la lernu-uzantojn.

Ĝuste la enmovadigo estas grava kaj serioza defio de SES — ege ofte gravas la unua kontakto kun la Esperantomovado, por ke oni decidu, ĉu la lingvo internacia (kaj la kulturo, movado ĉirkaŭ ĝi) indas je plua persisto.

SES estas oktaga somera Esperantolernejo, dum kiu oni povas en 26-hora kurso plibonigi sian Esperanton. Instruado okazis ĉiutage antaŭtagmeze, en kvar niveloj, ekde komencantoj, ĝis plej altaj progresintoj. Internacia teamo de spertaj instruistoj prizorgis diligente siajn grupojn. Grandan dankon al Stano Marček (Slovakio) — komencantoj, Dalia Pileckienė (Litovio) — komencantoj, Petra Smideliusz (Hungario) — progresantoj, Márta Kovács (Hungario) — progresintoj.

Posttagmezaj programeroj diversis — ekskursoj, manlaboroj, prezentoj, prelegoj, diskutrondoj, tabloludoj, diversaj kursoj. Menciindas almenaŭ kelkaj el ĉiuj: prelegoj pri *lernu.net* kaj pri E@I, mini-kurso pri la slovaklingvo, ĵonglado, paroligaj rondoj por komencantoj, kanto-instruado, tuttaga ekskurso al Vieno kun la vizito de la Esperanto-muzeo k.s.

Vesperaj kaj noktaj programeroj abundis speciale je muziko — prezentitaj estis: slovakaj popolkantoj en Esperanto (far populgrupo de Sarnovský), barda koncerto de Georgo Handzlik, repa koncerto de Tone (Antonio el Brazilo), muzikalaj kantoj de Atilla Schimmer el Vieno, Internacia vespero kun pluraj kantaj prezentoj. Johannes Müller kaj Jonas Dalmose kreis antaŭ la internacia vespero SES-kanton, kiu amuzis partoprenantojn.

Positiva raporto pri Esperanto kaj SES aperis en ĉefaj (plej spektataj) televidaj novaĵoj en privata televido *Markiza* en Slovakio.

Peter Baláž

Vroclavo: Fido, espero kaj amo

Dum la semajno antaŭ UK en Bjali-stoko (18–25 jul) en la pola urbo Vroclavo okazis la 19a Ekumena Esperanto-Kongreso (la 62a de IKUE kaj la 59a de KELI) kun pli ol ducent partoprenantoj el 19 landoj.

La kongreso okazis en Alta Porpastra Seminario. La temo de la kongreso estis prenita el la Unua Epistolo de la apostolo Paŭlo al la Korintanoj, ĉapitro 13, versiklo 13: "...fido, espero kaj amo, tiuj tri" kun la aldono "espero kristana aŭ monda senespero".

Altaj protektantoj de la kongreso estis prezidanto de Vroclavo Rafał Dutkiewicz kaj deputito de la Eŭropa Parlamento Ryszard Czarnecki. Honoraj protektantoj de la kongreso estis: Mons. Marian Gołębiewski, Ĉefepiskopo kaj Metropolito de Vroclavo, Lia Eminenco Henryk Kardinalo Gulbinowicz, emerita Ĉefepiskopo de Vroclavo, Lia Ekscelenco Jeremiasz Anchemiuk, Ĉefepiskopo, Ordinario de Pola Aŭtokefalia Ortodoksa Eklezio kaj Prezidanto de Pola Ekumena Konsilio, Lia Ekscelenco Monsinjoro Włodzimierz Juszczak, Episkopo de Ukraina Grek-Katolika Eklezio, Lia Ekscelenco Monsinjoro Ignacy Dec, Episkopo de Świdnica, Lia Episkopa Moŝto Ryszard Bogusz, Episkopo de Evangelia Aŭsburga Eklezio, Prof. D-ro Marek Bojarski, Rektoro de Vroclava Universitato.

Vespere sabate okazis en la seminaria kapelo inaŭgura ekumena Diservo. Dimanĉe antaŭtagmeze okazis apartaj Diservoj. Por evangelianaj kongresanoj ĝi okazis en luterana preĝejo de Dia Providenco, por la romkatolikaj en la preĝejo de la Plejsankta Virgulino Maria sur Sablo.

La solena malfermo de la kongreso okazis dimanĉe en belega salonego en la Vroclava Universitato; ĝin prezidis Miloslav Šváček, prezidanto de IKUE (romkatolikoj). En la solena malfermo ĉeestis kaj salutparolis reprezentantoj de la urbo, eklezioj kaj organizaĵoj. Grandan aplaŭdon rikoltis evangeliana-luterana episkopo Ryszard Bogusz, kiu sian sufiĉe longan alparolon faris en Esperanto. La kulturan enmetaĵon realigis junaj violonistino Joanna Lisiecka kaj pianistino Paulina Mazur. Konklude kantis kanton *Ave Maria* en Esperanto Mariusz Domaszewicz. La dimanĉan solenan tagon konkludis koncerto de Jadwiga Dzięgielewska.

La lundan antaŭtagmezon pri la kongresa temo prelegis la prezidanto de

KELI (evangelianoj) Philippe Cousson kaj la prezidanto de TOLE (ortodoksoj) Bojidar Leonov. La tagmeza komuna preĝo okazis en ortodoksa preĝejo de S-taj Cirilo kaj Metodio. La posttagmeza tempo estis disponigita al vizito de la urbaj vidindaĵoj. Vespera koncerto de religia poezia kanto okazis en grek-katolika preĝejo fare de pastro Bogdan Drozd. Post ĝi okazis perŝipa ekskurso sur rivero Odra dum estis iluminita la urbo Vroclavo.

La programo de la aliaj kongresaj tagoj estis simila: prelegoj, preĝoj, diservoj en urbaj diverskonfesiaj preĝejoj, koncertoj... La ĵaŭda antaŭtagmezo estis dediĉita al okazigo de la Ĝenerala Kunveno de IKUE kaj Jar-kunveno de KELI.

Merkrede okazis perbusa tuttaga ekskurso. En Świdnica oni vizitis la evangelianan lignan "Preĝejon de Paco", troviĝantan en la listo de la Monda Kulturheredaĵo de UNESCO, kaj la belegan romkatolikan katedralon, en kiu okazis la esperantlingva sankta meso. Sekvis vizito de la kastelo Książ, la plej granda en Malsupra Silezio. Kaj fine estis vizito de la kuraĉloko Szczawno Zdrój.

Preskaŭ ĉiumatene okazis en la seminaria kapelo la rozaria preĝo, post ĝi la sankta meso kaj la ekumena matena preĝo. La vesperaj programoj estis fermataj per ekumena vespera preĝo. La benitajn kongresajn tagojn sukcese partoprenis ankaŭ gefratoj blindaj kaj handikapitaj.

La kongreso en Vroclavo enskribiĝis per oraj literoj en la historion de la ekumenaj kongresoj. Ni esperu, ke plu sekvos la kongresoj kontribuantaj al la reunuiĝo de la kristanoj kiel tiu ĉi lasta.

Miloslav Šváček

Ferioj en Esperantolando

Dum du tagoj estis iom da pluvo, sed ĝenerale estis suna kaj agrable varma vetero dum la semajno de la 1 ĝis 8 aŭg, kiam okazis la sepa Somera Mezeŭropa Renkontiĝo (SOMERE) de Esperantolando. Ni kunvenis en Jünkerath en la montaro Eifel, sude de Kolonjo, kie ni jam dufoje pasigis agrablajn Esperantoferiojn. Ĉeestis 43 homoj el ses landoj kun granda plimulto de eksterlandanoj, kio donis al SOMERE la belan internacian etoson, en kiu Esperanto estas la kutima lingvo, eĉ por progresantoj. 13 infanoj kaj junuloj partoprenis, de suĉinfano ĝis adoleskulinaj; ses el ili parolas Esperanton denaske.

Oni povis sekvi prelegojn de Danka Leyk pri amo-rilatoj kaj kurson de Lode Van de Velde pri fotado, estis intensa kurso por komencantoj kaj komencintoj de Gunter Neue kaj paroliga rondo kun kantoj de Jean-Luc Kristos. Kantigis la kantemulojn ankaŭ Monique Van Roy kaj Lena Wilke, kiu prezentis krome proprajn kantojn. Kaj ni spektis la filmon *La Granda Diktatoro* de Charlie Chaplin kun Esperanto-subtitoloj.

Multe ni babilis en la ĝardeno de la domo, la infanoj ludis tie, oni kunmetis grandegan tridimensian puzzleon de Novjorko, ludis diversajn tablajn ludojn kaj amuziĝis en la luda halo de la domo. Ofte ni promenis, kelkaj kolektis arbopecojn por artaĵoj, ekskursis al fervoja muzeo, al najbara urbeto, plurfoje al lago kaj banejo kaj ĝenerale ni pasigis feriajn tagojn en internacia etoso.

La venontjara SOMERE verŝajne refoje okazos en la agrabla domo de Jünkerath, de la 23a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 2010.

Lu Wunsch-Rolshoven



La bonetosa SOMERE (Fotis Lode Van de Velde)



BET-45

La 45-aj Baltaj Esperanto-Tagoj okazis 8–12 jul en Paikuse (antaŭurbo de Pärnu) en Estonio. La ĉefa regiona renkontiĝo/tendaro ekestis antaŭ 50 jaroj (1959 en Latvio) kaj daŭras ĝis nun sen gravaj ŝanĝoj. Ĉi-jare partoprenis cent da esperantistoj (iom malpli ol cent oficialaj partoprenantoj kaj aldone gastoj porokazaj, ĉefe esperantistoj de Pärnu). Ili venis ne nur el la baltaj landoj Estonio, Latvio, Litovio, sed ankaŭ el Finnlando, Svedio, Pollando, Hungario, Belgio, Britio kaj Portugalio.

Ĉar nun estas epoko de interreto, oni ne multe okupiĝis pri informado kaj ĝeneralaj organizaj aferoj. La ĉefa atento estas koncentrita al kulturaj programeroj. Okazis multaj koncertoj (inkluzive de granda koruso el Bydgoszcz el Pollando kaj junulara ensemblo *La Animo* el Latvio). La nacia estona vespero kaj la balo donis eblon por dancado, kaj ankaŭ tia aktiva ripozformo tute taŭgas por nia publiko.

Okazis la tradicia Somera Universitato kun sciencaj kaj popularsciencaj (amatoraj) prelegoj, kelkaj ekskursoj (la plej longa al la marĉo Tolkuse), kaj promenado en urbo Pärnu.

Fotojn oni povas rigardi sub koncertaj temoj en Googlegrupo Estonio <http://groups.google.com/group/estonio> kaj videojn en <http://www.youtube.com/PeeterAitai>

Sekvontjare BET okazos en Litovio, kaj oni povas prognozi grandan partoprenantaron des pli ke la venont-jara UK okazos en la fora Kubo.

Peeter Aitai

Saluton KEF!

7–12 jul en la Hamleta urbo Helsingør (Danlando) okazis la 9a Kultura Esperanto-Festivalo (KEF) kun pli ol cent partoprenantoj junegaj (laŭ aĝo kaj spirito!). La ĉefa ejo de KEF estis loka lernejo, bone ekipita kaj kun multaj konstruaĵoj uzitaj por la programoj, por la loĝado kaj por aliaj celoj.

Dum la solena inaŭguro alparolis la aŭskultantaron la urbestro de Helsingør kaj delegito de la pollanda ambasadejo en Danlando. Krome, ŝtata regiona TV-kanalo filmis la tuton kaj intervjuis la moŝtulojn kaj membrojn de la organiza komitato. Plurfoje dum la KEF-semajno aperis artikoloj en la lokaj gazetoj kaj radio-kanaloj.

La celo de KEF estas prezenti originalan Esperanto-kulturon muzike, proze, poezie, teatre. La muzika parto okupis plejparton de la programo: koncertis kaj bone konataj grupoj kiel Ĵomart, Nataŝa kaj Carina, *Martin kaj la Talpoj*, JoMo, *Espo-Despo*, *Hotel' Desperado*, *Kapriol'*, *Solotronik'* sed ankaŭ relative novaj kiel *Junas kaj Plijunas*, *La Perdita Generacio*, hip-hopo *Pafklik'*, la repisto Tone, *Inicialoj D.C.* kaj *La Rokidoj*. Eblis ne nur ĝui la koncertojn en bela aparta loko, *Elverket* kien venis ankaŭ neesperantistoj, sed dum la tago la artistoj mem prezentis sin al la partoprenantoj kaj parolis pri la propra muzika itinero kaj respondis al la demandoj de scivolemuloj.

Pri prozo kaj poezio oni aranĝis du apartajn metiejojn: Sten Johansson gvidis tiun pri prozo kaj Nicola Ruggiero tiun pri poezio. Sten kapablis vekti la

dormantan verkiston en la brusto de la homoj kiuj elmontris kultivindan talenton pri prozaĵoj: ja per simplaj ekzercoj li instigis onin atenti pri stilo, ĉerpi inspiron de foto, bildo aŭ aparta situacio. Nicola diskutigis poemojn kaj kantotekstojn: plejparte la homoj mem esprimis propran opinion kun tre trafaj komentoj, tiel ke la publiko tre interagis kaj montris originalajn vidpunktojn pri poemoj, temoj kaj poezi-skoloj.

Du aparte interesajn teatraĵojn surscenigis la Tuluza Teatra Trupo (TTT): la unua estis komedieto pri du virinoj hazarde renkontiĝintaj en kafejo, la dua estis movada farso. Ne eblas en malmultaj vortoj priskribi ilin, sed sentu vin bonŝanca ĉar TTT oftege prezentas teatraĵojn dum kongresoj: nepre antaŭmendu sidlokon en la unua vico por plene ĝui!

Eksterordinara estis la “malferma posttagmezo” kiu estis programero organizita de la partoprenantoj mem, kiuj prezentis proprajn verkojn, kantis kaj ludis gitaron, violonon aŭ fortepianon, montris popolajn dancojn kaj multon alian! Entute plententa (nu, kelkaj esceptoj...) programero far profesiecaj amatoroj!

KEF ĉefe estas por esperantistoj, sed dum tiu ĉi oni sukcese montris nian kulturon al ekstera publiko per amaskomunikila informado, tapiŝafiŝado kaj drum-orkestrado tra la plenhomaj vojoj de la urbo, koncertado en aparta ejo tre vizitata de lokanoj. Mirinda estis la ekskurso prame al la sveda urbo Helsingborg en kies muzikejo koncertis la triopo Ĵomart, Nataŝa kaj Carina.

Ĉu menciis kelkajn makulojn de KEF? Sendube jes, kun la espero ke tiu ĉi kritiko estos akceptata samkiel dolĉa ĉerizo sur kuko: ĝi nur plibonigas jam frandindan aferon! Unue, la muzika parto gigantis kompare kun la literatura kaj la teatra: iel indus harmoniigi la tuton, kaj certe ne mankas artistoj kiuj kontribuu por la literatura kaj teatra flankoj. Due, aranĝi plibonan libroservon: Flo kunportis amason da kvalitaj KDoj, sed la libra sekcio estis magra. Trie, havigi pli da helpantoj: mi mem pretas rehelfi dum venonta KEF, kaj mi certas, ke multaj aliaj sin proponos se oni disanoncos partetan rabaton.

Fine, ni danku la organizan komitaton kiu senlace laboregis por briligiti tiun ĉi specialan aranĝon de Esperantujo: al Jacob, Jytte, Kimo, Gosia, Line kaj ĉiuj helpantoj; sed ankaŭ al la partoprenintoj kiuj kreis unikan etoson!

Nicola Ruggiero

Kongreso malfacile superebla

Ĉirkaŭ 400 partoprenantojn, inkluzive de kelkaj alilandanoj, kunvenigis 12–17 jul la 44a Brazilia Kongreso de Esperanto en Juiz de Fora.

La kongresejo estis malnova kolegio, kie nun funkcias Centro de Supera Instruado de Juiz de Fora. En ĝia interna korto instaligis budoj de pluraj organizaĵoj (Brazilei, KKE, Societo Lorenz, Amarílio Carvalho, BEJO ktp.). Dum paŭzoj la kongresanoj renkontigis kaj interbabilis en la korto. Ankaŭ de tempo al tempo tie okazis artaj prezentadoj.

Kadre de la malferma ceremonio en la Centro de Supera Instruado de Juiz de Fora dimanĉe oni, interalie, omaĝis la antaŭnelonge forpasintan Sylla Chaves per diapositivaj kaj deklamado. Ekde lundo komenciĝis la laborprogramo, kiu enhavis plurajn dekojn da prelegoj pri temoj Esperantaj, kulturaj, Brazilaj kaj aliaj, kies listigo okupus preskaŭ plenan paĝon en *La Ondo*. Kelkaj prelegoj estis en la portugala lingvo.

Dum la tuta lundo Pedro Cavalheiro gvidis kunvenon pri la kongresa temo *Junularo kaj Esperanto: Bazoj por la estonteco*. La junularo mem havis proprajn kunvenojn, kaj por la plej junaj partoprenantoj estis aranĝita Infankongreseto. La kongresanoj povis partopreni en seminario Lorenz (kun prelego, lanĉo de diversaj libroj de la eldonejo Lorenz, kaj arta momento), en simpozio pri la disvastigado de Esperanto per radio (Fabiano Henriques), kaj en renkonto de la Brazilia Sekcio de ILEI (José Roberto Tenório).

Ankaŭ okazis kutima kurso por komencantoj (Jair Salles), paroliga kurso (José Roberto Alves de Albuquerque) kaj supera kurso (Geraldo Mattos). Ilin akompanis enkonduko al la japana lingvo (Marcelo Vieira), dancado (Susana Assis), baza skriba kaj parola ekzamenoj (Francisco Wechsler).

Landa kongreso estas bona loko por prezentado de novaj kulturaj varoj. Ĉi foje estis lanĉitaj la libro *Esperanto por Lernejoj Klasoj* de Josias Ferreira Barboza, KD kun parolado de Ismael Gomes Braga, la libro *Mi estas Spirito* (Márcia Soares). Dominique Vieira prezentis la virtualan internacilingvan sciencan revuon *Teleskopo* kaj Rogener Pavinski lanĉis DVD *Esperanto estas...*

Ĉiuvespere la programo finiĝis per artaj prezentadoj. Poeziaĵojn deklamis Angela Faria kaj Neide Barros Rêgo. En la balo sonis muzikoj elektitaj de esperantista diskestro.



Estis prezentita portugallingva teatraĵo *Zamenhof — lingvisto kun poeta animo*. Gratulinda estas la reĝisorado, kiu inteligente sukcesis resumi 57 jarojn da Zamenhofa vivo en unu horo, kaj la profesia interpretado de la pli ol 10 geaktorj. La korto de la kolegio akceptis la Julian Folkloran Feston, kun esperantista kvadrilo gvidita de Angela Faria. Oni oferis al la ĉeestantoj tipajn julifestajn dolĉaĵojn kaj trinkaĵojn.

Resume: la 44a BKE estis inda festo de la brazilaj esperantistoj malfacile superebla de la venontaj brazilaj kongresoj: jen defio por la gesamideanoj de Campo Grande, Mato Grosso do Sul, kiu gastigos en la venontjara julio la 45an Brazilan Kongreson de Esperanto.

Aloísio Sartorato

Lingva diverseco en Meksiko

La 10a Meksika Esperanto-Kongreso okazis 18–21 jun en la Jura Fakultato de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM) kun 58 partoprenantoj el Germanio, Hispanio, Kubo, Meksiko kaj Usono.

Kvankam la kongresa programo komenciĝis jam vespere la 18an (jaŭde) per prelego de Luis Córdova Arellano

Estraranoj de MEF. De dekstre: David López, Morayma Martínez, Mallely Martínez kaj Daniel Moreno.



“La rezolucioj de UNESKO pri Esperanto kaj UNAM”, la malfermo okazis la vendredan matenon. Post la malfermo komenciĝis la laborprogramo kun entute dek prelegoj, plejparte en Esperanto, sed ankaŭ en la hispana kaj en la indiĝenaj lingvoj *mixe* kaj *náhuatl*.

Multaj prelegoj estis dediĉitaj al la indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj de Meksiko, kaj la kongresa temo estis “Lingva diverseco en Meksiko: fundamenta parto de ĝia kulturo”.

Aliaj prelegoj diversmaniere rilatis al temoj lingvistikaj kaj Esperantaj. Inter la prelegoj la kongresanoj vizitis la libroservon. Fine okazis Arta Vespere, kie, interalie, Morayma Martínez kaj Gabriel Jiménez prezentis belegan spektaklon kantan, en la zapoteka kaj la hispana.

Sabate okazis ĝenerala asembleo de la Meksika Esperanto-Federacio (MEF), kiu traktis, interalie, la jaran raporton, la laboradon de aliaj samideanoj, kaj aliajn temojn. Estis proponitaj novaj kotizoj. Post la asembleo Maritza Gutiérrez invitis al la 95a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Havano venontjare. La kongreso akceptis konkludojn pri la kongresa temo. Ĉeestantaj junuloj decidis krei junularan sekcion de MEF kaj diskutis la ĉefajn regulojn por ĝi.

La lastan kongresan tagon oni ekskursis al la vilaĝo Tepotztlán.

Daniel Moreno Martínez
Morayma Martínez Mateos
David López Rueda

Mongolio: la unua kurskunveno

La unua Mongola Kurskunveno de Esperanto okazis 9–10 jul 2009 en Ulanbatoro. Gvidis la bazan kurson Dogsuren Khurelbaatar, la elementan Deshigsuren Ganbaatar, la konversacian Chimedtseren Enkhee.

Okaze de partopreno de multaj komencantoj Ch.Enkhee prelegis al partoprenantoj pri Esperanto, homaranismo kaj Esperanto-movado, kaj D.Ganbaatar prelegis al ili pri reta komunikado kun esperantistoj de diversaj landoj kaj pri Pasporta Servo. La prelegoj multe interesis la partoprenantojn.

Dum bankedo kaj distra vespero oni prezentis al la partoprenantoj DVD-ojn en Esperanto, rakontis pri UK-oj en Pekino kaj Jokohamo, kaj prezentis la historion de Oomoto.

Fine de la kurskunveno ĉiuj partoprenantoj sukcese ekzameniĝis.

Chimedtseren Enkhee



Freŝo freŝe freŝa

La supra titolo koncernas interalie bieron markitan *FREŜA*. Temas pri drinkaĵo ellaborata laŭ metia teknologio. Ĝia gusto draste malsamas disde fluidaĵoj produktataj fare de la granda bierindustrio en la epoko de tutmondiĝo.

Ne ĉiuj el 75 esperantistoj, reprezentantaj ses landojn, venis fine de junio 2009 al Olŝtino nur por gustumi la “freŝan bieron”, tamen ĉiuj partoprenis FREŜON. La vorto estas neologismo ankoraŭ ne notita de PIV-o (kiu en la pola lingvo tamen signifas: biero). Ĝi estas deĉifrebla jene: **F**rusomera **R**enkontiĝo de **E**esperantistoj **Ŝ**atantaj **O**lŝtinion. Kiu venas kun ŝato, ricevas ŝaton. Do, Olŝtino ankaŭ ekŝatis esperantistojn. Tio estis videbla dum la sole naj malfermo kaj fermo de la aranĝo. Ili ambaŭ havis originalan formon de pikniko ĉirkaŭ fajrujo kaj ilia ĉefrolulo estis la jam menciita “freŝa biero”. Tiu drinkaĵo kaj akompana manĝaĵo estis regalo de la urbestro Jerzy Szmit, kiu aparte manifestis sian ŝaton al la esperantistoj, ĉar li ĉeestis la piknikon kun sia dekstra gambo engipsigita.

Urbaj instancoj kaj pluraj entreprenistoj malavare subvenciis FREŜON, rezulte la partoprenantoj ĝuis fabelan rabaton. Imagu en Eŭrop-Unia lando unusemajnan esperantistan aranĝon, kiu kostas ... 28 eŭrojn! Tiu prezo inkludis ne nur manĝadon kaj loĝadon, sed ankaŭ la menciitajn piknikojn, bankedon en la eleganta restoracio *Kolorowa*, laŭdeziaran uzadon de naĝejo kaj liberan vizitadon de la lokaj muzeoj. Krome la esperantistoj ne sentis sin katakombe perditaj en la urbo, sed estis okulfrape videblaj. FREŜO estas enprogramita en la Some-

ran Kulturan Festivalon, kiu okazas samtempe en Olŝtino. La esperantistoj “tumultis” dum diversaj festivalaj aranĝoj, ekzemple en la “Romaa Nupto”, sed ankaŭ mem atrakciigis la Festivalon.

La franca kanzonisto JoMo, plentitole Jean-Marc Leclercq, prezentiĝis en la subĉiela scenejo apud la urbodomo. Li altiris amason da publiko per siaj Esperantaj kantoj, fakte turistojn, kies parto eble neniam antaŭe aŭdis pri la lingvo internacia. JoMo ne vane estas notita en la *Guinness*-libro, ĉar li estas kantisto, kiu uzas en siaj prezentaĵoj plej multe da lingvoj. Cetere li estas poligloto, do en Olŝtino li mem gvidis sian koncerton pollingve.

En FREŜO laŭdinda estas ofta uzo de Esperanto. Kvankam ne ĉeestis multaj eksterlandanoj, tamen la lingvo internacia aŭdiĝis ofte kaj diversforme, ekzemple dum ekskursoj. Ili estis multaj, ĉar la regiono Varmio-Mazurio estas mirindaĵo de la naturo pro siaj centoj da lagoj kaj densaj arbaroj, sed ankaŭ pro la interesega historio, kiun respegulas valoraj objektoj de arkitekturo, aparte de la brikgotikaj kasteloj kaj preĝejoj. Specialan atenton ĝuas la kastelo en Olŝtino, kiun dum kelka tempo administris Nikolao Koperniko mem. La granda astronomo ĝuste en Olŝtino komencis verki sian revolucion verkon *Pri cirkulado de la ĉielaj korpoj*, per kiu li renversis la ĝistiaman koncepton de la kosma spaco.

Esperanto estis uzata en pluraj preleĝoj pri seriozaj temoj, interalie, de Aleksander Korĵenkov, kiu prezentis mal multe konatan vivon de L.L.Zamenhof en Grodno. Sed oni povis ankaŭ aŭskulti ne multe seriozajn rakontojn interalie de la subskribinto de tiu ĉi artikoleto. Alia

specifaĵo de la Olŝtina aranĝo estas kvizoj de Marian Zdankowski. Kutime esperantistoj timas partopreni tiuspecan ekzamenon, sed sub la komando de Marian la kvizoj estas vera plezuro. Cetere ili multe kontribuas al plialtigo de scio pri Esperanto mem kaj ankaŭ pri ĝia historio. Aparte mirinda afero estas konsiderinde valoraj premioj, kiujn oni ricevas pro la scio de Esperanto kaj pri Esperanto. Oni devas menci ĉi tie tiujn, kiuj venkis en la kvizo:

1. Teresa Pomorska (Pollando)
2. Edward Kozyra (Pollando)
3. Mirosława Kubicka (Pollando)
4. Paulo Branco (Portugalia)
5. Jerzy Kiljański (Pollando)
6. Diemantė Aniĉienė (Litovio).

Mi ne estas kronikisto kaj do preterpasas multajn interesajn okazintaĵojn en FREŜO mem kaj ĉirkaŭ ĝi. Tamen mi ne rajtas preterpasi jenan fakton. FREŜO estas organizata de kelkaj olŝtinaj esperantistoj, sed ĉefe de tri familioj, nome: Elzbieta, Andrzej kaj Adam Frenszkowski; la geedzoj Brygida kaj Andrzej Gielert, kaj la geedzoj Zdankowski. Jen bela ekzemplo, kiel multe oni povas fari, kiam la pacaj batalantoj pli pensas pri paco ol pri batalo.

Roman Dobrzyński

GelERT

Gelendjika Esperanta Renkontiĝo de Turistoj okazis 5–12 jul 2009 en la vilaĝo Krinica proksime de Gelendjik, en la suda Ruslando. En ĝi partoprenis 26 esperantistoj el Ruslando kaj unu el la malproksima Hispanio.

Danke al la hispana esperantisto, parolanta nek la rusan, nek la anglan lingvojn, dum la renkontiĝo regis Esperanto. Ĉar Krinica troviĝas sur bordo de la Nigra Maro, la partoprenantoj de GelERT multe baniĝis kaj sunbruniĝis. La vetero estis varma. Vespere oni multe kantis Esperanto-kantojn kun gitara akompano. Anatolij Ivaskenko (Krasnodar) prezentis sian libron *Amuze kaj serioze pri Esperanta leksikologio*. Kuiristino de malgranda kafejo, kie esperantistoj nutris sin, ofte regalis ilin per kabardaj pladoj. Vladimir Kosolapov faris por dezirantoj ekskurson al antikvaj dolmenoj en valo de rivero Ĵane kaj poste piedekskurson en la centro de la urbo Gelendjik.

En la fermo de GelERT ĉiuj konsentis, ke la renkontiĝo estis sukcesa: ĉiuj bone ripozis, amuziĝis kaj praktikis Esperanton.

Vladimir Kosolapov

Artoŝoko

Artoŝoko: tutsemajna korkuntremado kun Vincent van Gogh, profunda esplorado de lia vivo, de lia epoko, de la evoluo de lia arto, de lia persona homa dramo. Jen (finfine) programo kiu temas ne precipe pri lernado de Esperanto en si mem, sed *uzas* nian komunan lingvon por malkovrigi tre bone dokumentitan konon pri la destino de tiu malbenita artisto. Programo, rezulto de tutviva amo de mia edzino — Katalin Kováts — al tiu nevenkebla konkuranto mia: “Vincent”. Programo kiun — ĉi-somere (post Bretonio, Usono kaj Belgio), denove, tamen plezure — mi kungvidis kun ŝi.

Katalin estas elstara pedagogo, kaj, sendepende de la kursotemo, la 24 esperantistoj kiuj aliĝis por la pasintjulia kurso en Le Touquet (nord-Francio) venis certe ankaŭ por bani sin en la vigliga etoso de ŝiaj kursoj.

Sed elstara pedagogio — eĉ kiam ŝajnas spontana talento — postulas longdaŭran preparon. Tion mi povas atesti, dum semajnoj helpinte krei la imponan lernilaron, kiu plenplenigis nian aŭton. Tion gapante konstatis ankaŭ la partoprenantoj, vidante la murojn de la vasta kursosalono kovriĝi de pentraĵoj, la tablojn de tuta Van Gogh-biblioteko, la apudan ĉambiron pleniĝi de ĉiaspecaj strangaj bezonataj por la diversaj aktivaĵoj.

Kvankam niaj tagoj havis la guston de ferio, ili montriĝis ege intensaj kaj laborigaj. Bild- kaj vortludoj, teatraĵoj, diskutoj, tradukoj, kunlegado de leteroj, specifaj prezentoj de partoprenantoj, ankaŭ laŭtemaj gramatikaj testoj: malfacilas eĉ skizi kiel Katalin ĉiufoje alimaniere spertigis al ni la realon — kaj la diversajn teoriojn — ĉirkaŭ la vivo de Vincent. Eĉ tiuj, kiuj ne speciale ŝatis lin, kaptiĝis kaj kunsentis, kunvivis. Ridoj oftis, larmoj kelkfoje verŝiĝis. Estis bona vivo.

La projekto naskiĝis el la emo de partoprenintoj en pli frua kurso. La geedzoj Plutniak volis dividi sian sperton kun esperantistoj de sia regiono, norda Francio. Ili proponis tre komfortan gastejon kun ege helpema teamo — Stella Maris — kaj post la anonco de la kurso rapide aliĝis aliaj entuziasmoj el Belgio, Germanio, Britio, Ruslando, ĝis pleniĝo de la kurso. Mi — oficiala ĉefrespondeculo — spertis tiun kunlaboradon ekstreme plezuriga kaj efika, kaj deziras elkore danki al Arlette & Edmondo Plutniak kaj Xavier Dewidehem.

Sylvain Lelarge



Katalin Kováts rakontas pri van Gogh

Kion lerni en Esperanto-tendaro?

En la unua etapo de la tradicia 57a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov ĉi-somere estis ĉirkaŭ 60 geknaboj, plejparte por lerni la anglan, kaj nur kvin por lerni Esperanton. Tiun ĉi etapon ĉiam vizitas la samaj tendaranoj, kiuj kreis fortan grupon de geamikoj. Ili promesis prilabori moderne la tendaran TTT-ejon kaj pli bone varbi por la venonta jaro.

La duan etapon partoprenis nur ĉirkaŭ 40 personoj, kaj la trian nur 20, sed fine de la tria etapo okazis jam tradicia renkonto de ekstendaranoj.

Ni vidos, ĉu la retejo <http://www.set-lancov.cz/> aperos vere pli bona kaj alloga kaj helpas revenigi al SET tendaranojn, kiuj ankoraŭ en 1990 estis pli ol cent en ĉiu etapo.

Miroslav Malovec

TREP — turisma renkontiĝo

Jam la okan fojon EK Pilzeno okazigis TREPon — turistan renkontiĝon en la urbo Plasy. Same kiel en la pasintaj jaroj, nia renkontiĝo efektiviĝis meze de junio en la turisma tendaro Máj. Ĉi-jare alveturis partoprenantoj ne nur el Ĉeĥio, sed ankaŭ el Germanio kaj Francio.

La unua vespero estis tradicie kun kantado, gitarludo kaj projekciado de filmoj pri belaĵoj de la pilzena regiono. La duan tagon ni vizitis la faman regionan muzeon en Mariánská Týnice. Posttagmeze ni vizitis la ĉarman restoracion *Ĉe Rudolfo II*. Vespere prelegis Margit Turková pri pentristo Alfons Mucha kaj Libuše Dvořáková projekciis filmon pri la 92a UK en Jokohamo.

La trian tagon ni vizitis dum la tuttaga ekskurso atelieron de ŝtonskulptisto en la vilaĝo Kozojedy. La ĉefa celo de

nia ekskurso estis nove malfermita kastelo Zbiroh. La kastelo, origine burgo, estis fondita en la 13a jarcento. La kastelon posedis, interalie, tri imperiestroj: Karolo IV, Zigmundo kaj Rudolfo II. Pro tio ĝi estis nomata “Kastelo de tri imperiestroj”. Ni vizitis ankaŭ la urbojn Radnice kaj Rokycany.

Revenvoje ni havis tempon por viziti privatan muzeon de pin-rezino en la vilaĝeto Lomany, kiu estas verŝajne ununura en la mondo.

La lastan vesperon ni aŭskultis rakonton de Liba Gabalda kaj gesinjoroj Rynduch pri la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Herzberg.

Stanislav Pech

EDE: kiom da voĉoj en Francio?

(HeKo) Okaze de la lastaj elektoj por la EU-Parlamento praktike la sama nombro da francoj partoprenis la baloton, kompare kun 2004: 17.218.974 anstataŭ 17.169.034. Sed pro la kresko de la voĉrajtanoj (44.282.679 anstataŭ 41.510.298) la procento de la partoprenantoj malkreskis: 38,88% anstataŭ 41,36% de 2004.

La partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto ricevis entute 29 mil 263 voĉojn, kontraŭ 25 mil 279 en 2004: do 0,17% kompare kun 0,15% de 2004. La kreskon parte klarigas la fakto, ke EDE havis listojn en ok regionoj anstataŭ sep, kaj ĝuste en la oka (transmaraj teritorioj) ĝi estis aparte sukcesa, per sume 0,44%. La plej “esperantista” loko en Francio estas la antila insulo Saint-Martin, kun 1,58% de la esprimataj voĉoj, sekvita de Nova Kaledonio kun 0,96%.

En Eŭropo mem EDE registris grandan regreson en Francilio, do en la ĉefurba areo, kie ĝi sinkis de 5.789 voĉoj (0,21%) al 3.304 (0,12%). Ankaŭ la plej sukcesa regiono en 2004 (Okcidento) regresis de 0,24% al 0,20%, tamen gardante la unuan lokon en la interna klasifiko, kune kun la kompanse progresinta Centro (0,20% anstataŭ 0,15%). La stato en Sud-Okcidento (0,16% kontraŭ 0,15%) kaj Okcidento (0,17% kontraŭ 0,19%). Rimarkinda kresko en Sud-Oriento: de 0,09% en 2004 al 0,15% en 2009.

Efektive la sola kiu pravus tosti per ĉampano estus EDE en Nord-Okcidento (kun Bretonio kaj Normandio): de 799 al 4.677 voĉoj, de 0,03% (plej magra rezulto en 2004) al 0,19% nun. La ĝenerala kresko kompare kun 2004 ŝuldiĝas precipe al tiu ĉi regiono.

Laŭ *Normanda Bulteno*

Hispanio kongresis en Malago

La 68a Hispana Kongreso de Esperanto okazis en Malago 2–5 jul 2009 samtempe kun la 14a Andaluza Kongreso, kun ĉeesto de okdeko da geesperantistoj, kiuj ĝuis interesan programon.

Oni devas menciigi la prezentadon de la mondfama verko *Platero kaj mi* de la Nobel-premiito Juan Ramón Jiménez, tradukita de la akademiano Miguel Gutiérrez Adúriz, kiu samtempe profitis la okazon prezenti *Sferojn*, kolekton de scienc-fikciaj rakontoj.

D-ro Wolfgang Guenther parolis pri Esperanto-ekologiaj, ekonomiaj kaj sociaj argumentoj por neŭtrala lingvo internacia. Luis Serrano, la redaktoro de la revuo *Internaciisto*, vojaĝis el Katalunio por paroladi pri solidareco.

La novelektita prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Pedro Hernández Úbeda, paroladis pri la denaskismo kaj pri la agadprojektoj de HEF.

José Salguero, aktivulo de SAT kaj SATeH, prelegis pri “La renkonto je la sperto diskutigi per eŭropuniaj ebloj kaj respondecado de geesperantistoj kiuj ne rekte enkadriĝas en lernejoj medioj”.

Augusto Casquero, tre agema esperantisto, enamiĝinta al Ĉinio, kie li instruas Esperanton de antaŭ kelkaj jaroj, amuzis la ĉeestantojn per alloga parolado pri la ĉina edusistemo, kaj, kiel kutime, post la parolado kaj kunriĉado, li disdonis suvenirojn el Ĉinio.

Perla Martinelli, kiu redaktas la revuon *Femina*, paroladis pri la virinoj en la Esperanta literaturo kaj pri la poemo de William Auld *La infana raso*.

Rafaela Urueña, profesorino pri internacia juro kaj internaciaj rilatoj, prelegis pri la nuna tre interesa temo “Kial baloti en la Eŭropa Parlamento”.

Kiel kutime, okazis senpagaj ekzamenoj kaj kursetoj pri baza kaj meza kursoj, kaj dek kandidatoj ekzameniĝis pri niveloj A1 kaj A2, laŭ la ekzameno LTSEC, gvidita de Perla Martinelli kaj Andrés Martin.

La malaga kantisto Eduardo Vargas *Solo*, regalis nin per projekciado de DVD pri muzika ludado. Fatima Jiménez kaj Marie Quilly, hispana kaj franca amikinoj loĝantaj en Granado, proponis allogajn momentojn per filmetoj en Esperanto kaj per belaj kantoj. La Esperanto-Klubo de la Aksarkio kuraĝis deklami belegan mitologian poemon *La sonĝo de Endimion*.

Malgraŭ la varmego, la etoso estis amuza kaj la adiaŭo trista, sed kun la espero renkonti nin denove en Santiago de Compostela, kie okazos la 69a Hispana Kongreso. La plimulto profitis la okazon ekskursi tra la urbo, vizitante senpage la Alkazabon kaj la katedralon.

Ángel Arquillos

Serbio: eduki instruistojn

La kongreso de serbiaj esperantistoj okazis 16–18 jun en la urbo Jagodina. Partoprenis sepdeko da serbiaj esperantistoj kaj gastoj el Bulgario kaj Italio.

La partoprenantoj de la kongreso vizitis urban muzeon, muzeon de naiva arto kaj muzeon de vaksaj figuroj. Estis organizita A-ekzameno, komuna vespermanĝo kun amuza programo kaj dancoj.

Adem Jakupoviĉ prelegis pri lingvaj demandoj, Dimitrije Janičiĉ pri propeŭtika valoro de Esperanto kaj Boriša Miliĉeviĉ pri historio de lernado de Esperanto en serbiaj lernejoj. Oni vizitis la studentan domon “Sreten Aĝiĉ”. Sreten Aĝiĉ estis unu el la unuaj esperantistoj en Jagodina, kaj lian nomon portas loka Esperanto-societo.

En la konkludoj de la kongreso oni proponis prepari programon de edukado de Esperanto-instruistoj, plibonigi kunlaboron kun la Beograda *Verda Stelo*, kaj proponi al Ministerio de klerigado fakultativan lernadon de Esperanto en elementaj kaj mezaj lernejoj.

Dimitrije Janičiĉ

Paroliga kurso en Harbino

Invitite de Sing Ping, la ĉefrespond-eculino de Harbin-Yutong Evoluanta Instituto de Esperanto, mi kaj Ma Youngtae, akademiano de Esperanto, kune gvidis la Unuan Someran Buŝkurson de Esperanto en Harbino. 15 gestudentoj el kvar universitatoj partoprenis la kurson.

La kurso daŭris ekde la 15a ĝis la 29a de julio. La celo estis paroligi gestudentojn en Esperanto. En la komencaj du tagoj gestudentoj diris, ke ili ne bone komprenas. Mi diris al ili “Ankaŭ beboj ĵusnaskitaj ne bone komprenas la paroladon de plenkreskuloj, sed iom post iom ili ekkomprenas. Nun vi estas kiel beboj, kaj iom post iom ankaŭ vi povos pli bone kompreni nian paroladon, se vi persistas”.

Post kelkaj tagoj gestudentoj jam kutimiĝis kaj aktivis dum interparoloj. Sekve ni postulis, ke gestudentoj rekte interparolu kun fremduloj per skajpo. Interparolinte kun fremdaj esperantistoj, gestudentoj estis ege ĝojaj, ĉar fremdaj samideanoj bone komprenis ilin, kaj ankaŭ ili bone komprenis la paroladon de fremduloj.

Huang Yinbao, ĝenerala sekretario de Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio, vizitis la kurson post longa vojaĝo por ĝui la etoson de Esperantujo, ĉar mankas al li tia atmosfero hejme. Dum la restado en Harbino Huang Yinbao donis al nia kurso grandan helpon.

Kiam la kurso finiĝis, multaj gestudentoj tre bedaŭris pro nia baldaŭa foriro. Mi diris al la studentoj, ke ne ekzistas senfina bankedo en la mondo kaj promesis ke ni daŭre helpos ilian lernadon de Esperanto tra interreto kaj ili povos daŭre lerni senpage en nia hejmpaĝo: www.ciesp.cn.

Liu Baoguo

Harbinaj studentoj diligente lernas paroli Esperante.





Jubilea kurso en Valamo

En la Popola Instituto de Valamo okazis ĉi-jare la jubilea deka kursosemajno. Instruis Atilio Orellana Rojas kaj Patrik Austin, kiel kursogvidanto agis Tiina Oittinen, Jukka Laaksonen ĉiĉeronis en la monaĥeja areo kaj partoprenis en vesperaj aranĝoj.

La Popola Instituto situas en la areo de la monaĥejo de Valamo en la komunumo Heinävesi en orienta Finnlando. Ĝi estas ĉirkaŭita de belega naturo. La naturo kaj la trankvileco de la loko estas aferoj kiuj tre multe allogas la kursanojn al la loko same kiel por multaj la iom ekzotika ortodoksa vivo.

Dum la kursosemajno en Valamo estas 25-hora instruado, krome okazas ekskursoj kaj komunaj vesperoj. La kursanoj studis en du grupoj. La kursanoj de la elementa grupo havis la plej bazajn sciojn de la lingvo kaj povis rapide progresi. Ilin interesis ankaŭ la diversaj Esperanto-aranĝoj en la hejmlando kaj ekster ĝi. En daŭriga grupo la kursanoj konversaciis, resumis gazetajn tekstojn, enprofundiĝis en gramatikaj problemoj ktp. El ekster Finnlando ni havis du virinojn el Ruslando kaj Hispanio, kiuj rakontis pri siaj spertoj kaj montris fotojn.

Dum la kursosemajno eblas konatiĝi kun la ortodoksa vivo. Ĉi-jare okazis procesio al la monaĥeja tombejo kaj tie beno de la akvo, kiun ĉiuj povis sekvi sendepende de la religio.

Dum la vesperoj ni rememoris pri la pasintaj dek jaroj de la kurso, spektis tradician teatraĵon, kunkantis, kaj Patrik ludis muzikajn instrumentojn, kaj dancis. Dum la festa vespermanĝo (jaŭde) la atmosfero en la imperiestra salono estis gaja, kaj la diskutado okazis same flue Esperante kiel en la finna.

Venontjare la bonega kunlaboro kun Popola Instituto de Valamo daŭros. La rektorino en sia adiaŭa parolo dankis nin

pri ĉi-jara kaj antaŭaj kursoj kaj bonvenigis nin denove. La kursosemajno estos de 28 jun ĝis 2 jul 2010 kun la sama instrua teamo.

Tiina Oittinen

ĈET: printempo en somero

62 esperantistoj el sep landoj kunvenis 9–17 jun 2009 en Mielno (Pollando) okaze de la 31a Ĉebalta Esperantista Printempo, kies internacian karakteron atestis la naciaj flagoj de ĉiuj partoprenantaj landoj. Ili gaje flirtis en la vento kune kun la Esperanta flago kaj la flago de la Eŭropa Unio.

La solenan inaŭguron tradicie partoprenis la komunumestro de Mielno kaj kelkaj honoraj gastoj. La kunvenintojn varme bonvenigis Czesław Baranowski, la ĉeforganizanto de ĈEP ekde 1991, kaj poste salutis landaj reprezentantoj. Tre interesa estis distra parto de la solenaĵo preparita de Urszula Giercarz kun grupo da kantemuloj. Post abunda vespermanĝo sekvis interkona vespero kun gaja dancado.

La sekvan tagon komenciĝis la programo, en kiu troviĝis prelegoj, rakontoj, filmoj de Roman Dobrzyński, ĉiutaga lingvoperfektigado en du grupoj kaj lernado de novaj kantoj. Ĉiuj havis okazon rigardi interesajn fotoprezentadojn. Ege plaĉis al komencantoj la instruado de Esperanto per rekta metodo, kiun faris Stanisław Mandrak.

Multaj partoprenis ĉiumatendan Yumeiho-terapieton de Barbara Poterucha el Belgio. Malgraŭ nefavora vetero plene sukcesis busaj ekskursoj al Koszalin kaj Kołobrzeg. Neforgeseblajn impresojn lasis la adiaŭa vespero ĉe bivakfajro kun kolbasetrostado, dancado kaj gaja kantado. La lastan tagon en la tradicia resumo de la aranĝo, ĉiuj esprimis sian kontenton pri la organiza nivelo, interesa programo kaj neripetebla etoso.

Cz. B.

Unufraze

★ La fondaĵo *Pogranicze* (Limregiono) ricevis en la Bjalistoka UK la *Medalon de Toleremo* de la Fondumo Zamenhof. (*Bonhumora Zamenhofano*)

★ La Estraro de UEA decidis, ke la 96a UK okazos post du jaroj en Kopenhago (Danlando), la alia kandidato estis Madrido. (UK)

★ 5 jul 2009 lige kun la centjariĝo de Eo en la banurbo Les Sables d'Olonne (Francio) okazis tie diversmaniera publika prezentado de Eo en la stando sur la urbodoma placo, en la tendo sur la plaĝo, k en la librovendejo Voyelles, kie pluraj E-lernolibroj vendiĝis. (Henri Masson)

★ 11 jun Korea televido-stacio *Kanalo 4* faris 54-minutan intervjuon kun Lee Jung-kee kun la titolo “Jen estas internacia lingvo, Esperanto”. (Lee Jung-kee)

★ La 30an datrevenon de Kuba E-Asocio oni festis 10 jun 2009 en la sidejo de Granma Filio en urbo Bayamo, provinco Granmo, kun ĉesto de e-istoj, ĵurnalistino de Radio Bayamo k artistoj. (GEF)

★ En Vroclavo la panoramo pri la historia batalo de Raclawice nun havas sian aŭdan programon en Eo, tradukitan de Russ Williams k Anna Skudlarska, k voĉlegitan de Arono Chapman de *Radio Verda*. (Russ Williams)

★ La 42a Konferenco de ILEI en Krakovo elektis novan Estraron de ILEI: prezidanto Stefan MacGill, vicprezidanto Duncan Charters, sekretario Małgorzata Komarnicka, kasisto Julija Batrakova, membroj Radojica Petrović, Zsófia Kóródy k Julián Hernández. (GK UEA)

★ 90 homoj kunvenis 14 jun en la E-Domo en Tokio okaze de la tradicia Tago de Eo, ĉi-foje dediĉita al la Zamenhof-jaro 2009. (Landa Agado)

★ La Internacia E-Konferenco (julio en Kondoros, Hungario) voĉdone decidis, ke Spomenka Štimec estas laŭreato de la OSIEK-premio 2009 pro sia *Kroata milita noktlibro*. (MdZ)

★ En julio en Kinŝaso (DR Kongo) Radojica Petrović k Xose Conde okazigis unusemajnan E-seminaron por 25 komencantoj k 15 progresantoj. (Landa Agado)

★ La 2a Junulara Renkontiĝo inter Oomoto k Ŭonbulismo okazis en Seulo (Koreio) 28-30 jun 2009; ĝi estas la sola interreligia junulara E-renkontiĝo. (Landa Agado)



Laŭ eŭroparlamentano Michael Gahler, la nova lingva leĝo en Slovakio estas “absurda” (Foto de la Eŭropa Komisiono)

Monpunoj pro la malbona slovakia lingvo

Dafydd ab Iago el Bruselo

Ekde septembro membroj de neslovaklingvaj malplimultoj povas esti monpunitaj por nekorekta uzado de la slovakia lingvo. La nova leĝo kaŭzas ondon de protestoj en la hungarlingva minoritato en Slovakio — ĉirkaŭ dekono da loĝantaro. Aliaj naciaj minoritatoj estas romaa, rutena, ukraina, germana, kroata kaj ĉeĥa.

La monpunoj povas esti de 100 ĝis 5000 eŭroj. En komunumoj, kie malpli ol 20% parolas ne la slovakon (ekzemple, Bratislavo), funkciuloj kaj civitanoj povas esti monpunitaj pro uzado de minoritata lingvo laŭ sekcio 10, §9a de la Slovakia Lingva Leĝo, aprobita de la Slovakia Nacia Konsilio 30 jun 2009. Ĉiuj tekstoj sur monumentoj kaj memortabuloj devas esti aprobitaj de la ministerio de kulturo (sekcio 7, §5). Ankaŭ la nomoj de slovakaj urboj en alilingvaj tekstoj, ekzemple en la hungara, devas esti skribataj slovake (sekcio 5, §3a).

En la komunumoj, kie alilingvanoj estas plimulto de la loĝantaro, la slovakia devas antaŭeniri. La slovakia estas la deviga lingvo por enkonduki eventojn, organizatajn de minoritatoj, eĉ se ne estas slovaklingvanoj en la aŭskultantaro (sekcio 6, §5). Minoritataj lernejoj devas teni la internan komunikadon en la slovakia, eĉ se tio signifas aldonan ŝarĝon kaj koston (sekcio 6, §4).

Laŭ la slovakia ĉefministro Robert Fico, la protestoj estas

klara signo, ke hungaroj ankoraŭ ne komprenas ke Slovakio estas sendependa respubliko. Ekde la falo de la Aŭstria-Hungaria Imperio ĝi jam dum 90 jaroj ne estas parto de Hungario. Laŭ Fico, hungaroj volus, ke slovakaj lernejoj lernu hungare en la suda parto de Slovakio, kie hungarlingvanoj plimultas. “Tamen ni vivas en Slovakio, kaj ĉiu slovakia civitano devas havi la rajton, eĉ pere de sankcioj, paroli la slovakon ŝtatlingvon sur la Slovakia teritorio”, — diris la ĉefministro.

Ankaŭ membrino de la Slovakia Nacia Konsilio (SNS) Anna Belousovová ne komprenas la kritikojn. Laŭ ŝi, Slovakio estas paradizo por naciaj minoritatoj. Belousovová eĉ volas organizi eŭroponivelan kongreson por ekzameni la situacion de lingvo-minoritatoj kaj montri la bonan protektadon de malplimultoj en Slovakio. SNS ekde 2006 estas koalicia membro de la registaro kun la socialistoj sub Fico. SNS tamen rikoltis la famon de ekstremdekstra kaj ksenofoba partio.

Laŭ Laszlo Öllös, politologo el la universitato Nitra en Slovakio, la leĝo enhavas multajn malklarajn frazojn. Li pensas, ke tia malklareco estas intenca, por ke funkciuloj mem povu decidi, kie kaj kiam apliki la leĝon. Öllös notas, ke laŭ la nova leĝo, neslovaklingvano, kiu parolas sian lingvon kun doktoro, povas esti konsiderata kiel kontraŭulo de la leĝo.

La germana eŭroparlamentano Michael Gahler ne kaŝas sian kritikon de ĉi tiu leĝo. Laŭ Gahler, ĝi estas absurda kaj neproporcia. “Slovakio atencas la komune respektatajn normojn de la Eŭropa Unio kaj malrespektas la respektivajn rekomendojn de la Konsilio de Eŭropo, kiu antaŭvidas pluan uzadon de minoritataj lingvoj”, — diris Gahler. Slovakio malpurigas sian reputacion kaj riskos fariĝi denove totalisma ŝtato, se la nova leĝo estos strikte aplikata. Laŭ Gahler, la nuna slovakia registaro mense ankoraŭ ne venis en Eŭropon.

“La socialista-nacisma registaro en Slovakio refoje pruvis, ke ĝi ne estas interesata pri vera kunekzistado de etnaj grupoj en la lando. Ĝi ŝajne ne konsideras sin ligita per eŭropaj valoroj, — diris Gahler kaj konkludis: — Evidentas, ke naciaj lingvoj devas esti respektataj en la Eŭropa Unio. Tio devas esti egale aplikata en ĉiuj membro-ŝtatoj kun regionaj lingvoj aŭ minoritatoj”.

Esperanto kiel artobjekto



Fama grafikisto kaj instruisto de la Barcelona universitata faklernejo Escola Eina, Martí Ferré, petis prezenton pri Esperanto. Koscia ke grafikismo devas utili ne nur al grandaj entreprenoj, sed ankaŭ al popolaj grupoj, li proponis al siaj lernantoj grafikan laboron rilate al Esperanto-movado, kaj tial ni devis prezenti Esperanton al ili, por ke ili sciu pri kio labori.

Tion faris Anna Raventós, Guillem Sevilla kaj Ferriol Macip en februaro. En la unua parto de la prezento, oni faris rapidan lecionon pri la funkciado de la lingvo, kaj lernejoj rapidege kapablis fari vortojn per kunmetado kaj aldono de afiksoj. Oni parolis pri la historio de la movado kaj prezentis la nunan principaron de Kataluna Esperanto-Asocio.

Post debateto, kie lernejoj multe partoprenis, rilate al principaro de KEA, Guillem Sevilla lecionis pri tipografioj, ĉefe pri ĉapelitaj, kaj prezentis la grafikon kaj simbolologion de esperantismo laŭlonge de ĝia historio.


De tiam, lernantoj ekprilaboris siajn kreaĵojn: afiŝojn, la revuon *Esperanto*, identigilojn, KD-ujojn kaj flugfoliojn enhavantaj gramatikon kaj vortaron.

La 5an de julio lernejoj prezentis siajn laborojn. La 19an de julio Anna Raventós, Guillem Sevilla kaj Ferriol Macip reiris en la universitatan faklernejon por vidi la laboraĵojn. Kelkaj rezultoj estis mirindaj, kaj oni ekprenis kontakton kun kelkaj el ĵusbakitaj grafikistoj por eldoni iun kreaĵon.

Ferriol Macip i Bonet

Statistiko de Esperanto-renkontiĝoj

Antaŭ kelkaj jaroj mi komencis kolekti diversajn nombrojn pri Esperantujo. Unu el la rezultoj estas la ĉi-suba grafikaĵo pri unusemajnaj renkontiĝoj en Germanio kaj Pollando (ekde 2002; nur Ago-Semajno, AS). La Ago-Semajnon en Pollando mi aldonis, ĉar la plurjara malkresko de la Internacia Seminario (IS) koincidas kun la kresko de AS; homoj migris de unu al la alia.



Ĝis 1977 nur IS estis unusemajna renkontiĝo en Germanio; ĝi havis maksimume 127 partoprenantojn (en 1964/65). Post 1977 okazis kresko al intertempe sume ĉ. mil partoprenantoj en sep renkontiĝoj (ĝis fino de 2008). La novaj renkontiĝoj estiĝis jen jarfine (kiel IF, NR kaj AS), jen dum printempo kaj somero (kiel PSI, SEFT kaj SOMERE). Ene de trideko da jaroj okazis proksimume dekobligo de la suma partoprenantaro — aldono de ĉ. 900 renkontiĝaj gastoj (aŭ pli precize: gastadoj, ĉar ja kelkaj homoj plurfoje dum la jaro partoprenas, sed ne tre multaj).

La fenomenon de la kreskantaj unusemajnaj Esperanto-renkontiĝoj en Germanio (kaj lastatempe Pollando) Komitatanano Z en la julia numero de *La Ondo* priskribis per “iam okazis unu novjara renkontiĝo en Germanio, la fama Internacia Semajno, kaj nun du-tri”. Juĝu mem, ĉu tio estas trafa priskribo de la kresko.

Ĉu vere UK-oj tendence malgrandiĝas?

Komitatano Z krome asertis, ke mi “tamtamas”, ke “plimultiĝo de Esperanto-renkontiĝoj klarigas malpli grandajn UK-ojn”. Mi petis la redakcion liveri al mi la fonton — bedaŭrinde vane, Komitatano Z ne bonvolis respondi. Mi jes memoras, ke en iu diskuto mi atentigis, ke rigardi nur al la partoprennombroj de UK ne sufiĉas por kompreni la evoluon de Esperanto-renkontiĝoj. Sed mi ne memoras, ke mi skribis, ke la UK-oj malgrandiĝas — kaj fakte laŭ mi la partoprennombroj de UK-oj ne sufiĉas por aserti ion tian.

La UK-oj okazas sub tre diversaj cirkonstancoj — jen en okcidenteŭropa lando, jen en orienteŭropa; jen meze de Eŭropo, jen rande, jen ekstereŭrope; jen kun aktiva LKK, jen kun malpli varbema; jen kun multaj busplenoj da krokodiloj, jen kun grandaj ŝtataj subvencioj, jen sen tio ktp.

Por kompreni iun veran tendencon necesus konsideri ĉiujn tiujn influfaktorojn — sed tiam ne estas sufiĉe da unuopaj nombroj. Rigardu la apudan grafikaĵon pri UK-oj: Ĉu ni ploru, ke Roterdamo (1845 partoprenantoj, 2008) havis malpli da partoprenantoj ol Vilno (2344 p., 2005) aŭ ĝoju, ke estis pli ol en Zagrebo (1691 p., 2001)? Ĉu la movado malkreskis je 13 procentoj inter Montpellier (3133 p., 1998) kaj Berlino (2712 p., 1999)? Eble vi ŝatos fari mezumojn — ekzemple

ĉirkaŭ 1987 kaj ĉirkaŭ 2005, ĉu? Sed memoru la tiamajn ŝtatajn subvenciojn en orienta Eŭropo kaj la politikan situacion en tiu tempo, kiu forte logis homojn el orienta Eŭropo al internaciaj eventoj...

Rigardante la UK-nombrojn inter 1990 kaj hodiaŭ mi dirus, ke ili ondumas, sen klare videbla tendenco; la pli malgrandaj UK-oj okazis ĉefe ekster Eŭropo. (Kaj fakte plimultiĝis la ekstereŭropaj UK-oj kompare kun pli fruaj jardekoj.)

Kiel prijuĝi la evoluon de Esperantujo?

Ekzistas iu ĝenerala emo prijuĝi la bonfarton de Esperantujo laŭ membronombroj ks. Ankaŭ Komitatano Z ne eskapas tiun tro facilan vojon. Li memorigas la falon de membrecoj en UEA, SAT kaj fakaj asocioj, la malkreskon de gazetabonoj kaj la malaperon de libroservoj. Se ekzemple en Usono malmultiĝas librovendejoj, se malkreskas abonoj al paperaj gazetoj, se malgrandiĝas membronombroj de asocioj — ĉu tiam oni publikigas artikolojn pri tio, ke la nombro de enloĝantoj de Usono malkreskas (aŭ la nombro de anglaparolantoj)?

La statistiko de Esperantujo bezonas indikojn el multaj diversaj kampoj. Eble iam ĵetu rigardon al la vikipedia artikolo pri la temo, kiun mi grandparte verkis. En multaj kampoj okazas kresko — aldone al germaniaj renkontiĝoj ekzemple ankaŭ en muzikeldonado, ĉe denaskuloj kaj en Afriko. Membronombroj de asocioj estas escepto, preskaŭ ĉio alia evoluas kontentige. Kaj la falo de membrecoj fakte ne estas miraklo: Multaj homoj argumentas, ke hodiaŭ oni apenaŭ plu bezonas asociojn; eblas organizi Esperantujon per aliaj strukturoj.

Ĉar Komitatano Z tiom afable parolis pri mia “nepre admirinda aktiveco”, mi ne nur kritiku: En la antaŭlasta frazo de sia kolumno Komitatano Z donacas al ni profunde primedititan veron: “Ni ne estas pli multaj ol ni estas”. Kiu aŭdacus kontraŭdiri?

Ŝafoj en fremda lando


La artikolo en la julia *Ondo*, en kiu Komitatano Z provis iom statistikumi, memorigis min pri malnova ŝerco pri sociologo, fizikisto kaj matematikisto. Ili komune vojaĝas per trajno al lando, kie ili ne jam estis.

Rigardante el la fenestro la sociologo diras: “Vidu, du nigraj ŝafoj. Mi supozas, ke en ĉi tiu lando ĉiuj ŝafoj estas nigraj”.

La fizikisto avertas: “Nu, ne tiom haste, ni scias nur, ke estas almenaŭ du nigraj ŝafoj en ĉi tiu lando”.

La matematikisto precizigas: “Eĉ tion ne eblas aserti. Ni povas diri nur, ke estas almenaŭ du ŝafoj, kiuj je almenaŭ unu flanko estas nigraj”.

Lu Wunsch-Rolshoven





Ĉe la adreso <http://tradukejo.ikso.net> oni povas trovi novan projekton de E@I.

Temas pri tute rekonstruita sistemo por reta tradukado, kiun uzas E@I dum pluraj jaroj por siaj projektoj. Ekde nun la sistemo estas pli malfermita ankaŭ al la ĝenerala publiko.

Ĝia ĉefa avantaĝo estas, ke tradukataj tekstoj tuj post la konservado aperas en la retejo por la koncerna lingvo — la sistemo do estas duonaŭtomata. Tiel ŝpareblas tempo kaj homfortoj, kaj la tradukoj aperas en la koncerna retejo tuj, sen malŝparo de tempo kaj kroma bezono de programisto.

La ĉefa celo de la tradukejo estas liveri utilan kaj facilan manieron plurlingvigi diversajn retejojn kaj/aŭ tekstojn, kiujn oni bezonas en multaj lingvoj.

Per simila tradukejo okazis plurlingvigo de retejoj www.lernu.net, www.ikso.net, www.lingvo.info. Sed la tradukejo ankaŭ utilis por eldonaj projektoj, ekzemple, por la filmo *Esperanto estas...* kaj la broŝuro *Malkovru Esperanton*.

La retejo uzas novan komunan datumbazon de E@I-membroj, kaj sufiĉas registriĝi ĉe unu projekto kaj sekve uzi la saman salutnomon kaj pasvorton por ĉiuj ceteraj. Ekzemple, la registrita uzanto ĉe *lernu!* povas uzi siajn datumojn ankaŭ por la tradukejo kaj estonte ankaŭ por aliaj projektoj.

Tute nova kaj certe ŝatota parto de la nova tradukejo estas la eblo aldoni propran tekston por tradukado. La sistemo ebligas elekti, al kiuj lingvoj oni bezonas la tradukon (ĉu al ĉiuj, aŭ ĉu nur al la elektitaj). Krome eblas indiki, ke la tekston povu traduki personoj nur post aprobo de la teksto-enmetinto (ĉefe gravas por seriozaj tekstoj, kie necesas vere kvalita kaj senerara traduko).

La metitan tekston eblas en ajna momento korekti, ŝanĝi, kaj krome eblas “ŝlosi” la projekton, kiam tradukoj ne plu estas bezonataj. Dum tradukado eblas facile kontroli, kiel oni tradukas la tekstojn en aliajn lingvojn kaj eblas pridiskuti diversajn tekst-fragmentojn kun aliaj tradukantoj. Dum la tradukado aperas detala statistiko kun procentaĵo, kiu montras, kiom da teksto jam estas tradukita. Post kiam oni atingas 100%, eblas elŝuti la tekston por sia uzo.

La tradukejo estas en beta-versio, kio signifas ke oni konstante plibonigas la sistemon kaj evoluigas ĝin. Tamen la sistemo jam funkcias kaj estas uzebla — ĉiuj do estas bonvenaj uzi ĝin, testi la tradukejon — ĉu por aperigi proprajn tekstojn por traduki aŭ helpi traduki iun jam metitan tekston.

Peter Baláž

En la Esperanto-urbo Herzberg



La fama germana artisto Peter Götze Güttler kreis por Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg (ICH) medalon okaze de la Zamenhof-jaro. La unuaj laŭreatoj de la medalo estas la urbestro de la Esperanto-urbo Herzberg Gerhard Walter kaj la prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio

Rudolf Fischer.

En la Bjalistoka UK komenciĝis monokolektado por la monumento Zamenhof en la Esperanto-urbo Herzberg. Ĉi tiun projekton apogas la urbaj aŭtoritatoj. La monumento estos konstruita el blanka marmoro.

ICH

Kiun lecionon mi faris?

En la julia *Ondo* estis skribite, ke “Maria Majerczak faris provlecionon” en la Krakova Sciencfestivalo (p. 23). Tio ne estas ĝusta.

Provlecionojn (aŭ siajn unuajn lecionojn) faras lernantoj en metodika kurso, preparanta ilin al la instruista profesio. Ili **provas** fari lecionojn por lerni, antaŭ ol ili akiras la kapablon instrui kaj iĝos instruistoj. Trejnisto de instruistoj-metodikistoj kontrolas tiujn lecionojn kaj faras komentojn, por ke pluekzercante, la studentoj povu perfektigi.

Instruistoj, ankaŭ komencantaj, faras **modellecionojn**, ekzemple, por gekolegoj aŭ vizitantaj ilian klason studentoj lernantaj por iĝi instruistoj.

Leciono (numero) **nulo** estas komenca leciono, ne apartanta al la kurso, kiu sekvas. Ĝi povas esti destinita al la kulturo ligita kun la lingvo, al diversaj aspektoj de la vivo de la lingva komunumo ktp. Ĝi povas ankaŭ enhavi sintezan prezenton de la lingvo aŭ de ties eroj.

Por varbi aŭ informi en publika loko, oni faras **publikan** lecionon, kiu ofte havas kaj prezentan, kaj studan karakteron. Ideoj por tia leciono multegas.

Kompreneble, oni povas varbi por Esperanto ne nur per lecionoj, sed ankaŭ per granda aro da diversaj rimedoj.

Maria Majerczak

19 jun 2009 en Zagrebo forpasis

Dalibor Brozović (1927–2009)

elstara jugoslavia kaj kroata filologo, membro de la Jugoslavia, Kroata kaj Makedonia akademioj, direktoro de la Leksikografia Instituto Miroslav Krleža, vicprezidanto de Kroatio en 1990 kaj parlamentano (1992–1995). Esperantisto ekde 1946, li ofte menciis Esperanton en siaj fakaj verkoj, mem verkis en Esperanto kaj tradukis, kunlaboris en *La Suda Stelo*. Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1988), prezidanto de la Kroata Esperanto-Ligo (1992–), prezidanto de LKK de la 86a UK en Zagrebo (2001).

12 jul 2009 en Vieno post longa malsano forpasis

Helga Farukuoye (1943–2009)

aŭstra lingvoinstruistino, denaska esperantistino, post edziniĝo kun niĝeriano dum kelkaj jaroj ŝi instruis Esperanton en Afriko ĉeeste kaj koresponde, pro kio ŝi ricevis premion Degučić (1998). En 1994 magistriĝis pri interlingvistiko en Budapeŝto kaj dum 1995–2004 laboris en la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

Rememoraĵoj pri la unua tempo de Esperanto

La fino de la artikolo de Petro Stojan



IV

La okcidenteŭropaj samideanoj, kiuj skribis pri historio de nia lingvo, nomis la unuan periodon “slavo-germana”, aŭ “germano-slava”, aŭ “slava”. Ŝajnas, ke nesufiĉa scio pri la unua periodo estis la kaŭzo de tiuj neĝustaj kaj malprecizaj nomoj. La sola nomo por tiu periodo, se ni pacience konsideros ĉiujn konatajn faktojn, povas esti nur “rusia”.

Ni volas distingi inter “rusoj” kaj “rusianoj”, antaŭe nomataj “ruslandanoj”, ĉar sen tiu justa distingo la aferoj malklariĝas, la kompreno iĝas neebla. Antaŭ la Rusia Revolucio 1917 — en la vasta Imperio, en Rusio, plimalpli pace me kunvivis cent diversaj popoloj. Ĉiuj rakontoj pri la intergenta malamo kaj malpaco ĉe tiu popularo, kiujn obligis la okcidentanoj, oni devas akcepti kiel ordinarajn informojn pri la urbaj ribeltoj kaj perfortoj, ne pli gravaj ol tiuj kiuj ĉiujare okazas jen en Parizo, jen en Bombaĵo, Nov-Jorko, Konstantinoplo. Profesia mensogo de ĵurnalistoj, precipe de kiuj malŝatis la orientajn landojn, estas kulpa pri tiu malvero kaj kalumnio. Se salajritaj apaĉoj kaj stratbubegoj prirabis dekon da hebreaĵ butikoj, bastonbatis kelkajn procentigistojn — post kelkaj horoj la tutmonda reto da telegrafiloj jam bruis pri la “pogromo”, pri miloj da viktimoj, pri amasa buĉado. Vi ĉiuj memoras, ke la unuaj depeŝoj pri la tertremo, antaŭ kelkaj jaroj, parolis pri la kompleta detruo de la triono da Japanio, pri dek kvin milionoj da pereintoj... Nun ni scias, ke la tuta nombro da pereintoj en la tuta Japanio estis nur kelkmil. Por disvendi la numerojn, la ĵurnalistiko kutime troigas kaj tiu trograndigo proporcias al la malproksimeco de la lando.

Sed, “ni revenu al niaj ŝafoj”. Do, en Rusio pace vegetis centgenta popolo, kies klera parto tre bone kunvivis —

ruso kun judo, polo kun armeno, ukrainano kun tataro, ktp. — ĉiuj egale sub la patra zorgado de la milokula registaro. Nu, kiuj estis la unuaj pioniroj, unuaj verkintoj, unuaj adeptoj de Esperanto? Ili estis plejparte “rusianoj”: rus-pola hebreo Zamenhof, rusa polo Grabowski, rusa litovo Dombrovski, rusa ukrainano Borovko, siberia ruso Martakov, okcidenta ruso Devjatnin, orienta ruso Dmitriev, tataria ruso Semizorov, krimea rusa judo Ostrovski k.m.a. En tiu miksaĵo da rasoj kaj lingvoj ni kaptas nur unu komunan trajton: ili ĉiuj estis anoj de Rusio.

En decembro 1892 “La Esperantisto”, gazeto presita en Schalke-Germanio havis 544 abonintojn, el kiuj 335 rusianoj, t.e. 62%. En decembro 1894 la sama nombro estis 596, el kiuj 361 rusianoj, t.e. 61%. En komenco de 1914 la rusia gazeto “La Ondo de Esperanto” havis nur en Rusio saman nombron da abonintoj, kiel la internacia “Esperanto” en la tuta mondo. En 1912 nur unu studenta rondeto en Petrogrado (kie floris dekoj da tiaj rondetoj) nombris pli da membroj ol iu “Federacio” de eŭropa regno.

Sed, ne sole per sia nombro, ankaŭ per siaj internaj kvalitoj la rusia esperantistaro estis kaj ĉiam estas la avangardo de nia movado. Oficiale... ĝi nun ne ekzistas... Ni bone memoras, ke dum la 17-a Kongreso¹⁴, kie partoprenis pluraj rusoj kaj rusianoj, parolis en la solena malfermo la naciaj reprezentantoj, tre abundaj, ekzemple: kvar hispanianoj: hispana, kataluna, valencia, baska, kvar germanoj: germania, aŭstria, bohemia, danziga, kvin britoj,... sed eĉ unu ruso ne aŭdiĝis. Tamen, en la liberspirita respubliko, kie okazis la Kongreso, nenia baro ekzistis kontraŭ tio, ke parolu iu ruso je la nomo de almenaŭ eksterusiaj samideanoj.

Kiam en 1898 S-ro Bofron’ fondis la

gazeton “L’Espérantiste” kaj la societeton por la propagando de esperanto, la rusiaj samideanoj amase kunlaboris en la unua kaj amase aliĝis al la dua, kiu fakte estis internacia societo kun anoj de ĉiuj nacioj. La preparaj laboroj de la Delegacio¹⁵ 1900–1907 estis grandaparte ebligataj dank’ al la sumo de 10.000 orfrankoj, sinofere donacita de S-ro Efstifeev, rusa akademiano, kiu tiumomente ne dubis, ke tio helpas al la venko de nia lingvo.

La fakto, ke la Unua Libro aperis en la rusia lingvo, tiu unuavide stranga fakto restas preskaŭ nekonata por la vasta publiko, kaj nekomprenebla por la iniciatintoj de nia afero. Efektive, Zamenhof — kiu estis kiel diras ĉiuj “Historioj” polo aŭ pola hebreo — ŝajne devus ĝin publikigi en iu ajn alia lingvo. Sed tia nekompreno sekvas nur ĝeneralan miskomprenon ĉe la okcidentanoj, kiuj volas koni la historion de Esperanto sen koni la lokon kaj tempon kie ĝi krejiĝis.


Zamenhof estis spirita ido de tiu vasta homoceano, kio ondumas inter vera Eŭropo kaj vera Azio, tio estas inter 20-a kaj 60-a meridianoj, kie formiĝis aparta socia medio, tiom malsimila al la praktika, mongajnama Eŭropo. El tiu oceano, patrujo de Tolstoj, Dostojevski, Gorki, kaj mil aliaj noblimumuloj, venis la aŭtoro de nia lingvo, kaj nature li eldiris siajn unuajn parolojn pri la Nova Sento en la lingvo de sia spirita patrujo. Malgraŭ ĉiuj artifikoj de la regaĉantoj la kleruloj de cent tieaj popoloj, ekstere dividitaj per religioj, tradicioj, dialektoj, policlimoj — interne estis unuigitaj per unu spirito, kies larĝeco superas butikistan menson de eŭropa “elito”. En nuna momento, kiam la grava socia malsano ankoraŭ turmentas tiun vastan landaron, la elito anatemas ĉion, kio originas el ĝi, sendistinge ĉiujn, ekzekutistojn kaj viktimojn, krimulojn kaj senkulpulojn...

La Unua Libro estis publikigita en la fino de 1887... tiel skribis Zamenhof en 1889. Poste, li diris en iu publika kunveno ke la Unua Libro aperis la 21-an de julio 1887, kaj tiun daton ripetas la plimulto da verkistoj. Tiu ŝajna malakordo estu klarigita, por fine ĉesigi la diskutojn pri la dato, sur kiu ni bazas la jubileojn de Esperanto.

Tiu malakordo venas pro la dusenca uzo de la titolo “La Unua Libro”, kiu jen signifas la ruslingvan parton de tiu verko (kvinlingva), aperintan el la presejo de Kelter la 21-an de julio (laŭ la cenzurpermeso de la 2-a de junio), jen — la tutan verkon, kiu kiel la postaperinta Fundamento konsistas en kvin partoj: rusa, pola, franca, germana, angla. Tiuj kvin partoj aperis sinsekve, kiel kvin broŝuroj, en daŭro de ses monatoj. Tiel, tute ĝuste diris la aŭtoro ke “La Unua Libro” estis publikigita en la fino de l’ jaro, t.e. tiam kiam ĉiuj kvin naciaj partoj aperis. Estas rimarkinda fakto ke Zamenhof prezentis fundamenton de sia lingvo ne sub internacia formo (esperanto-esperanta), sed sub la kvinlingva nacia. La Fundamento sankciita de la Unua Kongreso 1905, estas ankaŭ prezentita sub kvinnacia formo, ĝuste kiel la Unua Libro. Nur ĉiuj kvin partoj, kune konsiderataj, komplete reprezentas la fundamenton de Esperanto, kompletigante kaj korektante reciproke unu la alian. Ekzemple, en la rusa parto de la Unua Libro ekzistas verbo *speri* (esperari) kaj *tombi* (fali); en la franca parto, kiu aperis kvar monatojn post la rusa, tiuj restaĵoj de la krea periodo estas ĝustigitaj: malaperas “*speri*” anstataŭita de “*esperari*”, kaj la radiko “*tomb*” signifas “*tombo*” (enterigejo). Aliaj detaloj sammaniere diferencigas la kvin partojn de La Unua Libro, kiu kompletigis nur je la fino de 1887.

Dek ok jarojn post tio, Zamenhof skribis en la Antaŭparolo al la Fundamento: “La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj (kvar) lingvoj oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto”.

En 1885 nia lingvo jam estis preta, ĝi ja havis la definitivan formon, sed necesis trovi la eldononton. En 1878 nia lingvo havis alian formon kaj nomon (“Lingwe uniwersala”), kvankam iom simila al la nuna. La jaron 1876 ni rajtas konsideri kiel veran komencon de



la krea laboro de esperanto, bazante sur la diro de Zamenhof, en “La Esperantisto” 1889. Zamenhof estis tiam nur 17-jara... tro juna, pensos multaj, por la serioza laboro, memorante eble ke Dekart’ komencis sin okupi pri la filozofio nur en la aĝo de 50 jaroj, kiel Herŝel pri la astronomio... Al tio ni povas respondi per alispecaj faktoj: Paskal’, ekzemple, eklaboris matematikon estante 9-jara; nenion sciante pri la fako, li memstare eltrovis tridek du teoremojn, kiujn starigis Eŭklido (antaŭ Kristo). Same ne sciis juna Zamenhof pri centoj da projektoj de mondlingvo, kiam li palpe laboris, ŝanĝante siajn ideojn, evoluante de la “filozofiaj” al la praktikaj lingvoprojektoj, ripetante en sia infana ludpenado la historiajn stadiojn de la mondlingva movado, analogie al la homa embrio, kiu trairas fazojn de vermo, fiŝo, reptilio kaj kvarpedulo, antaŭ ol fine ricevi la homan formon.

Antaŭ tricent jaroj seriozaj barbuloj kombinis: aba, baba, abe, babe, eba, beba... “kreante” la vortojn de “filozofia” lingvo. Poste, infano Zamenhof ripetis la saman ludon, baldaŭ ĝin forĵetis, kaj fine kreis pli maturajn formojn de la lingvo. Sed, jen mirigas nin “seriozuloj” kiuj — post tricentjara evoluo — revenas malantaŭen, rekomencas la infanaĵojn, ekzemple iu “reverendulo” en Usono kiu eldonas gazeton en la lingvo “Ro”¹⁶, kombinantan el “aba, ebe, ibo...” Ni havas antaŭ niaj okuloj, ni ilin bone frotas, larĝe malfermas, dubante pri la realeco... gazeton “Roia” kiu eniris 20-an jaron de sia ekzisto (ŝanĝante la titolon, ĉar la reverendulo

volas progresi). En tiu periodaĵo estas propagandata la lingvo kiu aspektas jene: ABZ EK HAB GOYO BICAK TIKTAF; AB ELI RUFF PIPAL ID ABE (hieraŭ ni havis malbonan veteron; mi skribas leteron al mia frato).

Kio estas ludo por infano, ĝi iĝas iufoje stultaĵo por plenaĝulo. Tricent jaroj da historio de mondlingva movado. Kvindekjara evoluo de Esperanto. Kvincent projektoj de mondlingvo. Tio ĉio ne estis sufiĉa por kuraci kelkajn nuntempajn homojn de ilia stulteco. Ili volas reembriiĝi. Stulteco ne apartenas nur al kelkaj, — al multegaj. Kaj tial ekstaras la nova problemo: sociigo de la mondlingvo. Jen estas nova perfektigilo, lasta vorto de l’ scienco, destinita al ĉiuj. Sed la plimulto da tiuj ĉiuj estas homoj nekapablaj distingi inter aĵoj saĝaj kaj aĵoj stultaj. La plej bela koncerto vanas antaŭ la surdularo. La plej fruktopova semo pereas sur la ŝtona grundo. Jen ankoraŭ unu frazo kiun ni legas en “Roia”: “EB EY UR EB EN, AM EL AT WA... ĉu esti aŭ ne esti — tiel staras nun la demando...” Kaj ni mediteme ripetas tiujn vortojn de Ŝekspir, skribitajn en la malproksima de ni epoko de la “filozofiaj” lingvoj. Se post tricentjara evoluo de la homa penso, en la mondlingva fako, ni — en la momento de la kvardekjara jubileo de Esperanto — legas: “EB EY UR EB EN, AM EL AT WA” en gazeto kiu venis al ni el la lando de l’ estonto, el la Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko, ni emas dubi pri la realeco de la progreso...

Ĉu esti aŭ ne esti?.. — kaj la vivo respondas “esti”. Ni akceptu la vivon tian kia ĝi estas, la homaron tian kia ĝi reale ekzistas, kun ĝiaj ombregoj, kaj lumetoj. Zamenhof esperis ricevi dek milionojn da aliĝoj dum la unua jaro... Ni esperas atingi dek mil... ĉe UEA... en proksima jaro 1928... La vivo kuras nin de niaj iluzioj. La tasko anonciĝas pli granda, ol ni pensis antaŭ la milito. Des pli bone... tio plisaĝigu kaj instruu nin. Se ĉasistoj de facilaj laŭroj forlasas mondlingvan movadon, tio nur utilas por ĝi. Kaj ni... “semas kaj semas, neniam laciĝas, pri l’ tempoj estontaj pensante; cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, — ni semas kaj semas konstante”.

La originala teksto aperis en la ĉeĥoslovakia revuo *La Progreso* (1927, №1–2, 3, 4–5, 6, 8) kun la pseŭdonimo O.D. Ribaulb.

Petro Stojan. Rememoraĵoj pri la unua tempo de Esperanto

Notoj

1. Ĉi tiu kolekto ne estis retrovita.
2. Ivan Aleksandroviĉ (Jan Nieciślaw) Baudouin de Courtenay (1845–1929) favoris la ideon de la internacia lingvo, kontribuis al la interlingvistiko, konis Esperanton, sed li ne konsideris sin esperantisto (vd. *Problemy mejdunarodnogo vspomogateljnogo jazyka*. M.: Nauka, 1991, p. 229).
3. En la moderna rusa lingvo “ĵid” (Р жид) estas pejorativa; sed, ekzemple, en la pola lingvo ĝi plu restas neŭtrala kaj ĝenerale uzata.
4. Ne estas konata serioza ruslingva verko, en kiu Zamenhof estus nomata luterano.
5. Pri la nomoj de la Zamenhofoj legu en *Homarano* de Aleksander Korĵenkov (Kaliningrado: Sezonoj, 2009, p. 17–21).
6. En *Enciklopedio de Esperanto* mankas informoj pri Vladimir Majnov. Laŭ Holzhaus li estis studento, poste ĵurnalisto en Peterburgo (DLE, p. 255); laŭ Drezen li estis funkciulo de la sekreta polico (*Historiaj studoj*, p. 155). Georgij Korotkeviĉ citas lian koncizan sinprezenton al Tolstoj (*Informacionnyj bjulletenij ASE*, 1987, №1, p. 20; ankaŭ Orig 1, Postparolo, p. 7).
7. Temas pri Aleksandr Aleksejeviĉ Postnikov (1880–1925), prezidanto de la Ruslanda Esperantista Ligo, en 1911 kondamnita pro spionado al okjara bagnado.
8. Zamenhof en sia kongresa parolado en Ĝenevo (1906) intencis identigi la internan ideon kun la *Deklaracio de homarano*, sed pro insisto de Hyppolyte Sebert kaj Émile Javal li ne faris tion, kaj la koncepto “interna ideo” restis neklara.
9. MEH, p. 128.
10. MEH, p. 141.
11. August Kerckhoffs (1835–1903), filologo kaj kriptografo, la plej aktiva volapukisto en Francio, la unua prezidanto de la Akademio de Volapuko.
12. Vladimir Karloviĉ Rozenberger (1848–1918), Peterburga fervoj-inĝeniero, la dua direktoro de la Akademio de Volapuko (1892–1898), la aŭtoro de la interlingvistika principo de la internacieco, sur kiu baziĝis Idiom Neutral.
13. La lasta parto de la Zamenhofa studo *Esperanto kaj Volapük* aperis en *La Esperantisto*, 1890, №7 kun promeso “Daŭrigo venos”, sed ĝi neniam estis finita.
14. La 17a UK okazis 3–7 aŭg 1925 en Ĝenevo kun 953 aliĝintoj.
15. La Delegacio por akcepto de internacia helplingvo (1901–1910) en 1907 formis Komitaton, kiu elektis Esperanton kondiĉe, ke ĝi estu ŝanĝita laŭ la ideoj de la Delegacio kaj de la projekto de Ido interkonsente kun la esperantista Lingva Komitato.
16. Ro estas planlingva projekto (1906) de la usona reverendo Edward Powell Foster (1853–1937). En 1923–1928 (–1931?) li eldonis en sia lingvo, interalie, la revuon *Roia*.

La 19an de septembro 2009 en Poznań
Aleksander Korĵenkov prezentos sian novan libron

“Homarano”
kadre de la jubilea XXV-a
ARKONES

Literatura konkurso Liro-2009

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro-2009*. Ĉi-jare la organizanto proponas tri originalajn branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Recenzo de la romano *Serpentoj en la puto* de István Nemere (Kaliningrado: Sezonoj, 2009).

En la 1a kaj 2a branĉoj oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj, en la 3a branĉo — nur per unu verko.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2009.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas).

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizanto ĝis 1 jan 2012 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

La 12a Internacia Fotokonkurso

Post dek unu sukcesaj konkursoj (1998–2008) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la 12a Internacia Fotokonkurso.

Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj, senditaj elektronike, ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2009.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2010.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2010.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* en 2010.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) por la plej bona foto pri la temo *Infanoj*.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en *La Ondo de Esperanto*. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro 2011 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

El Popola Ĉinio

Baldaŭ post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko (1 okt 1949), en marto 1951 estis fondita, en la ĉeesto de registaraj reprezentantoj, la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL). Jam antaŭ la fondo de ĈEL, ĝia prezidanto, veterana esperantisto Hujucz, samtempe estro de la Eldona administracio, sukcesis atingi, ke la Fremdlingva Eldonejo komencis eldoni monatan revuon en la internacia lingvo kun la titolo *El Popola Ĉinio* (EPĈ).

En majo 1950 aperis la unua numero de EPĈ kun la subtitolo “monata informo bulteno eldonata de Fremdlingva Eldonejo”. Ĝi estis okpaĝa, grandformata gazeto kun nigra-blankaj gravuraĵoj, celanta liveri interesajn materialojn, utiligeblajn en alilandaj naciolingvaj gazetoj.


En la jaroj 1952–1953 la formato de EPĈ ŝanĝiĝis, ĝi estis eldonata en la formo de kultura revuo kun kolora kovrilo kaj materialoj pri la vivo kaj kulturo de Ĉinio. La amplekso kreskis ĝis 24 paĝoj.

En la decembra numero de 1953 aperis neatendita informo: “... nia redakcio decidis ĉesigi la eldonadon de *El Popola Ĉinio*, kaj tiu ĉi estas ĝia lasta numero”. La redakcio klarigis, ke la ekzisto de periodaĵoj kaj libroj en naciaj lingvoj “ebligas al la diverslandaj legantoj rekte kaj pli bone kompreni Ĉinion”. La vera kaŭzo estis, ke la rilato al Esperanto en la orienteŭropaj popoldemokratiaj landoj iĝis tiel malfavora, ke ili rifuzis enlasi la revuon.

Post kelkjara paŭzo, en 1957 EPĈ estis restarigita. Ĝis 1966 ĝi aperis sesfoje jare kiel 32-paĝa eldonaĵo de ĈEL. Ĝi estis tiutempe la sola gazeto en Esperanto kun kolora kovrilo, kaj en 1963 aperis koloraj paĝoj ankaŭ interne. Rapide kreskis la legantaro kaj la perantaro. En la sesdekaj jaroj EPĈ havis legantojn en pli ol 500 urboj de Sovet-Unio, kaj ĝia eldonkvanto superis 20 mil ekzemplerojn.

Aparte rimarkindaj estis belegaj lignogravuraĵoj, kiuj ilustris multajn tekstojn. Ilia stilo estis influita de la tradicia ĉina arto de papertondado. (En 1953 aperis koncerna artikolo klariganta la fenomenon de la “Moderna Ĉina Lignogravuro”).

De 1967 la gazeto ĉiumonatiĝis, sed dum deko da jaroj ĝia enhavo fokusiĝis precipe al la t.n. “Kultura Revolucio”,



kio perdis multajn eksterlandajn abonantojn.

Ĉirkaŭ 1974 komencis reaperi artikoloj pli ĝeneralaj, kaj la politikaj polemikaĵoj eldoniĝis kiel apartaj suplementaj kajeroj. Depost 1978, sub la influo de pli liberaj vojaĝkondiĉoj en- kaj eksterlande, la enhavo de EPĈ pli kaj pli internaciigis. Aperis ne nur informoj pri la enlanda movado, sed ankaŭ pri esperantista agado en eksterlando. La revuo komencis utiligi kunlaboron de alilandaj samideanoj. Ekde 1982 la redakcio regule faris enketon inter la legantoj por elekti elstarajn artikolojn, bild-paĝojn kaj kovrilojn de la antaŭa jaro. Krome, tiamaniere la legantoj donis grandan kvanton da proponoj kaj sugestoj por enhavo de la revuo.

Kvankam en la unuaj jardekoj de la revuo pli grandan spacon okupis senkritika bildo pri la Popola Ĉinio, pri la konstruado de la nova vivo, en la revuo troviĝis paĝoj pri la antikva ĉina historio, artikolserio pri la ĉina ŝako; en 1958 startis kurso de la ĉina komuna parollingvo (Han-lingvo). En la kuirarta rubriko publikigis receptoj de ĉinaj pladoj. Aperis interesaj artikoloj pri la ĉinaj tradiciaj festo-tagoj, pri la familiaj kaj personaj nomoj de ĉinoj, pri papertonda arto, tradicia pekina opero, pri ĉinaj poetoj. En la januara numero de 1963 mi kunplezuro malkovris ilustritan artikoleon pri la jam forgesita fadena ludo, kiun ankaŭ mi praktikis infanaĝe.

En la 1980-aj jaroj legantaro popularecon ĝuis rubrikoj: *Vojaĝo tra Ĉinio*, *Enciklopedieto de Ĉinio*, *Ĉinaj Artoj*, *Ĉina Literaturo*, *Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ*, *Por via sano*. Diversaj nacioj kaj nacimalplimulto de Ĉinio, La Silka vojo kaj Yangzi-rivero estis prezentitaj

per artikolserioj. Oni povis ĉerpi sciojn pri la terakota armeo, kaligrafio, kuracaj mangaĵoj, ĉina gimnastiko, lakmetiarto, elafuroj, pandoj kaj multaj aliaj interes-aĵoj.

Danke al tiuj temoj — ne pro temoj politikaj aŭ Esperanto-movadaj — la revuo akiris amason da amikoj tra la mondo, kion oni povis konstati per amase partoprenataj EPĈ-kunvenoj en la diversaj UK-oj. Siaflanke, la redakcio tenis kontakton kun la legantoj, petante opinion pri la aperintaj numeroj kaj sugestojn por la temoj de la venontaj kajeroj. Verŝajne neniu alia Esperantogazeto tiel zorgis pri la legantoj. Estis bela tradicio de etaj donacetoj al la legantoj: papereklondajfo, kalendaroj.

Tiu ĉi bele presata revuo havis kromrezulte ankaŭ propagandan signifon por Esperanto, okupante centran lokon en Esperanto-ekspozicioj. Tre grava estas ĝia kontribuo al la lingvo per tekstoj pri diversaj fakoj. Ĝia lingvaĵo estis senriproĉa.

Ĝi estis iaspeca “fenestro al Ĉinio”, tamen fenestro al la oficiala Ĉinio. EPĈ, abunde ornamita per feliĉe ridetantaj vizaĝoj, aperigis nur la oficialan vidpunkton pri la eventoj sur la placo Tjan’anmen kaj pri la Tibeta problemo. Sed la legantoj pardonis al ĝi la preskaŭ senkritikan bildon de Ĉinio pro ĝia ekstereŭropeco, ĝia amplekso, ĝia bela aspekto, ĝia nesimileco al la ceteraj Esperanto-gazetoj.

En majo 2000 *El Popola Ĉinio*, festanta sian 50-jariĝon kaj 500-numerriĝon, aperis kun aparte parada kovrilo, kiu devis, laŭ la redakcia komento, montri “la karakteron kaj iritan vojon” kaj prezenti “esperon, ke EPĈ havu belan estontecon”. Sed la oktobra kajero anoncis, ke la revuo ne plu eldoniĝos kiel papera, sed daŭrigos sian ekzistadon nur rete pro “manko de monrimedoj kaj konstanta malpliigo de la abonantoj”. Pro la kreskanta pragmatismo en Ĉinio — iom-post-ioma malgraviĝo de la ideologiaj motivoj kaj prioritatiĝo de la faktoroj ekonomiaj — la ŝtato reduktis sian subtenon al Esperanto kiel al informkanalo. Malaperis la bezono vivteni la revuon kun granda etato kaj reduktiĝanta abonantaro.

La malaperon de EPĈ multaj taksis grava bato por Esperantujo. Kvankam la retejo www.espero.com.cn reprenis la temaron de la revuo kaj aperigas luksan jar-almanakon, tio ne povas kompensi la mankon de la bela, akurata kaj nemultekosta *El Popola Ĉinio*.

Halina Gorecka

Esperanto en kulturo de malriĉeco

Dobrzyński, Roman. *Bona Espero: idealo kaj realo. Verkita laŭ interparoloj kun Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia.* — Martin: Stano Marček, 2008. — 256 p., il.

La plej nova libro de la pola ĵurnalisto Roman Dobrzyński, dediĉita al la brazila Bona Espero, baziĝanta sur interparoloj kun ĝiaj gvidantoj: Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, maltrankviligas kaj esperigas.

Ĝi maltrankviligas uzantojn de la ceremonia, kongresa, *festa Esperanto*, ĉar montras funkciadon de la lingvo ankaŭ en ne decaj, malhelaj flankoj de socia vivo kiel mizero, perforto, ŝtelado. Ĝi esperigas tiujn, kiuj vidas en la internacia lingvo ne nur komunikan, sed ankaŭ socian rolon.

La duoblan karakteron de la priskribita pli ol kvindekjara historio de la fenomeno “Bieno-Lernejo Bona Espero” esprimas ankaŭ la subtitolo: *idealo kaj realo*. Ilia konfronto iĝas defio por stereotipaj imagoj de esperantistoj kaj pri la komunumo en Bona Espero, kaj pri ili mem.

Al stereotipaj imagoj de esperantistoj pri Bona Espero apartenas ankaŭ bildo de la brazilaj orfaj infanoj vivantaj en paradiza (des pli, ke la regiono nomiĝas La Alta Paraíso), senproblema, natura kaj socia medio. Se tiel aspektas la idealo, la realon la libro prezentas tute alie. Ĝi estas ligita kun la rapida evoluo de brazilaj urboj kaj maldensiĝo de kamparana loĝantaro, karakterizaj por la tria mondo. Infanoj edukataj en Bona Espero devenas de malriĉaj socitavoloj:

Homoj, kiuj vivtenas sin per peza, primitiva agrikulturo, fuĝas de sia malriĉeco kaj falas en la urban mizeron pro senlaboreco. Dum en la grandaj urboj ili ŝveligas malriĉajn kvartalojn, nomatajn en Brazilo “favelas”, en Alto Paraíso ilia stato ŝajnas pli favora. ... ili facile ricevas senpage parcelojn kaj monhelpon por starigi domojn. Baldaŭ en tiuj elrevitaj urbaj domoj ili kaŝas sian senesperan malriĉon. Nur malmultaj el ili kiel oficistoj aŭ instruistoj ĝuas konstantan salajron, aliaj vivas de propraj negocetoj, aŭ kiel dungitaj vendistoj, purigistoj, portempaj laboristoj, sed almenaŭ triono havas nenium okupon. (p. 25)

La malfacilaj vivkondiĉoj de la esperantlingva komunumo elvokas provon de karakteroj de esperantistoj: volontuloj kaj apogantoj. La galerio de eksterbrazilaj vizitantoj (inter kiuj aperas nomoj el la unuaj paĝoj de Esperanto-gazetoj) montras, ke inter tipoj de volontuloj ne mankis malsukcesintoj. Ĝuste ilin la kunparolantoj de la aŭtoro priskribas kiel esperantistojn vivantaj en “la ebura turo de teoria amo, frateco, amikeco”, indiferentajn pri infanoj. Valoras memori tiun ĉi rimarkon, ĉar ĝi devenas de la esperantista Bonaespera realeco, de postulema praktiko, al kiu apartenas defio de (ankaŭ Esperanta) eduko.

La libro forte atestas, ke la socia rolo de Esperanto sin prezentas ankaŭ kiel perilo kontraŭ socia marĝeniĝo de malriĉaj socigrupoj, al kiuj apartenas la infanoj edukataj en Bona Espero, kelkfoje ankaŭ iliaj familioj. Tiu rolo de la lingvo realiĝas forme de la agado de la esperantistoj devenantaj el diversaj landoj.

Bona Espero: idealo kaj realo ne eniras en la purajn modelojn de libro: jubilea, historia, dokumenta, vojaĝa k.s. La leganto trovos en la publikaĵo kunekziston de ĉiuj fadenoj: jubilea, dokumenta, historia k.a. Li eĉ povas senti sin iomete perdita pro ilia nekutima plektado. La libro tamen, pere de siaj dudek partoj, klare direktiĝas al certa formo de antropologia “kazo-studo”. Pro sia kona valoro la verko de Roman Dobrzyński devas esti deviga legaĵo por ĉiuj, kiuj interesiĝas ankaŭ pri sociologio de Esperantaj lingvo kaj movado. Enhave kaj pro uzata intervjuo-metodo la libro atingas en la Esperanta socia literaturo signifon — laŭ mia opinio — relative kompareblan kun la signifo en antropologio de la klasika verko de Oscar Lewis *The Children of Sanchez* (1961). Oscar Lewis iĝis konata pro la difino de “kulturo de malriĉeco”, kiu devenas de publikaĵoj pri meksika malriĉa familio. Kulturoj de malriĉeco estas multobligataj dum vivo de sekvaj generacioj de malriĉuloj. Motivo, kiun enkondukas la libro pri Bona Espero sin prezentas jene: Esperanto estas ankaŭ perilo kontraŭ marĝeniĝo de la homoj vivantaj en kulturo de malriĉeco.

Zbigniew Galor

bonaespero@terra.com.br
www.bonaespero.org
www.bona-espero.de

Spegulo. Aŭtuno 2009

Ĉu en Pollando ekzistas somero? Probable jes, sed ĝi estas tre mallonga. La 17an de junio finiĝis en Mielno la Ĉebalta Esperantista Printempo, kaj meze de julio en nia poŝtkesto jam kuŝis la aŭtuna kajero de *Spegulo*, kiu enmondiĝis almenaŭ dek tagojn antaŭe.

Sojle de la Bjalistoka UK la redakcia mesaĝon afable aŭtoris ... Zamenhof mem. Ĝi estas dediĉita al la rolo de esperantistaj kongresoj. Sekvas versaĵo *Al la verda popolo* de Julio Baghy.

La ĉefa materialo de la kajero estas la 40-paĝa ese de Andreas Künzli “*Bjalistoko*” laŭ la percepto de Zamenhof-biografioj. Künzli esploras Bjalistokajn ĉapitrojn en kelkaj konataj verkoj de Edmond Privat, Ernest Drezen, Maria Ziółkowska, Marjorie Boulton, Ryszard Kraško, Ludovikito, René Centassi kaj Henri Masson. La svisa interlingvisto konkludas, ke la aŭtoroj kutime baziĝas sur la antaŭe eldonitaj biografioj, aldonante iujn novajn faktojn kaj proprajn interpretojn kaj elpensadojn. La ĉefa malvirto estas manko de scienceco en la esplorado kaj prezentado de la materialo. Bjalistoko aperas en tiuj biografioj kiel “negativa” urbo, ŝablonece kaj primitive montrita.

Per traduko de Ionel Oneț oni konatiĝas kun la teksto de la parolado *Pri ĝojo en Oriento kaj Okcidento* de la rumana filozofo, eseisto, literatura kaj arta kritikisto, ankaŭ politikisto Andrei Pleșu. La aŭtoro prezentis ĝin malferme al la Internacia Festivalo de Salzburg (2003). Li montras kio estas ĝojo por okcidentano kaj por orientano, vivinta sub diktaturo; kiel diferencigis la koncepto de “memkompreneblo” por ambaŭ (temas pri la eŭropaj Okcidento kaj Oriento). Li konkludas: “La eŭropa unuiĝo signifos, interalie, ankaŭ unuiĝon de niaj ĝojoj, harmoniigon de la ĝojspertoj okcidentaj kun la orientaj”.

La unua feriado eksterlande estas rakonto de Gerrit Berveling pri la mediteranea feriado de junulo baldaŭ post la milito. Fragmento el *Homara epopeo* omaĝas la forpasintan brazilanon Sylla Chaves.

Jerzy O. prezentas Howlin’ Wolf, la ĉefan figuron de la ĉikaga bluso.

Kazimierz Leja adaptis por papera publikigo sian prelegotekston *Perkomputila teksto-prilaboro por ĵurnalisto kaj redaktoroj*.

Legis por vi
Halina Gorecka


Vojaĝo ĉirkaŭ mia ĉambro

Maistre, Xavier de. *Vojaĝo ĉirkaŭ mia ĉambro* / Tradukis el la franca Gonçalo Neves. — Chapecó: Fonto, 2008. — 72 p.

La aŭtoro de tiu kurioza libro, naskita en 1763 en Savojo, karieris kiel oficiro kaj defendis sian landon kaj ties suverenon kontraŭ la franca armeo, kaj, post elmigro al Rusujo, servis en la rusa armeo, i.a. kontraŭ Napoleono. Li mortis en 1852, post la puĉo de “Napoleono la Malgranda”, feliĉe ne travivinte la anekson de Savojo al Francujo en 1861.

Lia verketo *Voyage autour de ma chambre* publikigis en 1795 zorge de lia pli fama frato Joseph, fama kontraŭ-revolucia polemikisto, kaj ricevis grandan sukceson, similan al la sukceso de *A Sentimental Journey* de Sterne. Tiu famo manifestigis en la naskiĝanta Esperantujo. La esperantlingva traduko far Samuel Meyer ĝuis tri eldonojn inter 1904 kaj 1907.

La aŭtoro, kiu dum sia vivo plurfoje ŝanĝis sian loĝlokon, spertis en 1790 kvardekdu-tagan punan enkarcerigon en sia propra hejmo pro duelo. El tiu sperto naskiĝis tiuj kvardek du ĉapitroj (kiuj tamen, diference de taglibro, ne koincidas kun difinitaj tagoj), en kiuj la aŭtoro transformas la devigan kaptitecon en hedonisman, ironian filozofiadon pri ĉio, kion inspiras al li la enhavo de la



ĉambro, la konduto de lia lakeo kaj precipe la rememoroj, pensoj, ideoj pri la ekstera mondo, kun ties moroj, sociaj konvencioj, diskutoj pri artoj ks ks. Resume: malkonstruo de la tradiciaj vojaĝorakontoj en tiu senmova vojaĝo, malapero de la tempaj kriterioj en tiu ĉiudirekta digresiado, diletanta skeptiko kaj moko al la socia seriozo, sed ankaŭ rifuĝo for de la tiuepokaj kruelaĵoj. La lasta ĉapitro eĉ transformiĝas en ian halucinon per apero de fantomaj personoj el la helena tempo : Hipokrato, Platono, kaj precipe Aspazio.

Gonçalo Neves liveras al ni

tradukon pli modernan, ol tiu de Meyer, al kiu li tamen prave omaĝas. En 1904 Meyer verkis tradukon en senpropra lingvaĵo, ankoraŭ legebla kun plezuro. Evidente, kio estis ĉe Meyer *seĝego*, *banderolo*, *pafilego*, *glavo* estas ĉe Neves *fotelo*, *rimeno*, *kanono*, *spado*. Neves korektis la eraran *korporalo* al *kaporalo*. Sed ambaŭ tradukintoj parolas pri *varmejo* por tio, kion ni prefere nomas *forcejo*. Ambaŭ skribas “vi aŭdis paroli pri...”, dum “vi aŭdis pri...” sufiĉas. Ambaŭ uzas la vorton *bienoj*, dum la senco de la franclingva *biens* estas *havaĵoj*, *valoraĵoj*, kaj en tiu epoko ankaŭ *plezuraĵoj* aŭ *avantaĝoj*. Kaj Neves ne ĉiam pravas en siaj elektoj. Meyer uzis la vorton *agordilo*, al kiu certe preferindas *agordoforko*, sed kiu ne samsencas kun *diapazono*, uzata de Neves. Pri detaloj de klasika franca lingvo, kiun uzas la aŭtoro ankoraŭ fine de la dekoka jarcento, Meyer estis pli subtila: *faire l'amour* ne estas uzata en la senco de *amori* (Neves), se de *amindumi* (Meyer), *gorge* ne estas nur *gorĝo* (Neves), sed (pri virino) *brusto* (Meyer), *veste* ne estas *vesto* (Neves): fakte ĝi estis speco de longa silka ĉemizo, por kiu Meyer uzis la malpli malĝustan terminon *veŝto*. Indas scii ankaŭ, ke en la tiama iom ceremonia lingvaĵo *neveux* estis ankoraŭ uzata en la senco de *nepoj* (tiuj, kiuj nin benos), kion sciis Meyer.

Post listigo de tiuj korektendaĵoj, oni povas tamen konkludi, ke la traduko de Neves aspektas pli senĝena, pli flua por ni, legantoj de la 21-a jarcento (Meyer parolis ankoraŭ pri *centjarof*). Krome, Neves uzis la plej fidindan kaj plej bone dokumentitan eldonon de la *Vojaĝo*, el kiu li ĉerpis interesajn klarigajn notojn.

Tradukantoj havas ofte kapdolorojn pro la verkotitolo. Tiu ŝajne simpla *autour de* starigas timindan problemon, kiun Meyer solvis per la traduko *Vojaĝo interne de mia ĉambro*. Nia ĉirkaŭ ja povas, pli ol la franclingva *autour de*, sugesti la eksteron kaj eĉ nekonstantan distancon. Neves konsciis la problemon kaj, post aludo al pluraj alilingvaj tradukoj (el kiuj forestas la rusa, kiu montrus, ke la ĝusta traduko estas ne *около*, sed *вокруг*), sprite pravigas la uzon de *ĉirkaŭ* per la konstato, ke la aŭtoro, enfermite en sia ĉambro, tamen vojaĝas mense ekstere(n) kaj en lia verko “temas do pri vojaĝo samtempe interna kaj ekstera”. Tia ambigua rezonado certe plaĉus al Xavier de Maistre.

Michel Duc Goninaz

Vinilkosmo proponas mp3-servon

Post longa preparado *Vinilkosmo* malfermis mp3-servon. Ĝi ebligas akiri laŭleĝe per elŭtado Esperanto-muzikon. La adreso: <http://www.vinilkosmo-mp3.com>.

Belartaj konkursoj de UEA 2009

La 30an de julio en Bjalistoko estis solene anoncita la rezulto de ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj de UEA. La ĉeestantaj laŭreatoj ricevis diplomojn.

POEZIO

Unua premio: *de tiu ĉi ĝarden' narnia* de Nicola Ruggiero (Italio);
Dua premio: *Esja* de Nicola Ruggiero;
Tria premio: *Tro rapide* de Jean-Marie Ries (Luksemburgo).
Partoprenis 34 verkoj de 17 aŭtoroj el 16 landoj.

PROZO

Unua premio: ne aljuĝita;
Dua premio: *Viola* de Julia Sigmond (Rumanio);
Tria premio: *Ranoj* de Sten Johansson (Svedio).
Partoprenis 24 verkoj de 15 aŭtoroj el 10 landoj.

ESEO

Premio Luigi Minnaja: *Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn* de Lena Karpunina (Ruslando);
Dua premio: *Lingvo kaj dialekto* de Geraldo Mattos (Brazilo);
Tria premio: ne aljuĝita.
Partoprenis 9 verkoj de 5 aŭtoroj el 4 landoj.

TEATRO

Unua premio: ne aljuĝita;
Dua premio: *La papilio* de Luiza Carol (Israelo);
Tria premio: *La preludo de la milito* de Lena Karpunina (Ruslando).
Partoprenis 8 verkoj de 7 aŭtoroj el 6 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO

Ĉirkaŭ la mondo dum 80 tagoj de Jules Verne, eldonita de *Sezonoj* (Ruslando).
Partoprenis 6 verkoj de 4 eldonejoj el 4 landoj.

KANTO

Unua kaj dua premioj: ne aljuĝitaj;
Tria premio: *Minimuma familio* de Geraldo Mattos (Brazilo).
Partoprenis 3 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

FILMO

Unua, dua kaj tria premioj: ne aljuĝitaj;
Honora mencio: *Stelo de Bona Espero* de Adarci Sousa (Brazilo).
Partoprenis 1 verko de 1 aŭtoro el 1 lando.

PREMIO NOVA TALENTO

Folke Wedlin (Svedio) pro la poemo *Ĥodapro en tarda serptempo*.

La premio *La infanlibro de la Jaro*, kiun *Sezonoj* ricevis pro *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj* de Jules Verne rekonfirmas la popularecon de ĉi tiu verko inter la infanoj, adoleskantoj, junuloj kaj eĉ plenaĝuloj en la tuta mondo. Krome, la premio rekonas la altan nivelon de la traduko de Jean-Luc Tortel kaj la belan art-arangon de Larisa Jakovleva, al kiuj la eldonejo kore dankas pro la elstara kontribuo.

Ĝi ne estas la unua infanlibra premio de *Sezonoj*. Antaŭ ok jaroj en Zagrebo nia eldonejo ricevis la premion *La infanlibro de la Jaro* pro *La hobito, aŭ tien kaj reen* de J.R.R. Tolkien, tradukita de Christopher Gledhill kaj William Auld (kantoj).

Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj estas aĉetebla en la libroservo de UEA kaj en aliaj grandaj libroservoj kontraŭ 20 eŭroj. **HaGo**

Ricevitaj gazetoj

Aveno, 2009/33; Bonhumora Zamenhofano, 2009/1,2,3,4,5,6,7,8; Dia Regno, 2009/1,2; EAB Update, 2009/46; Esperanta Finnlando, 2009/3; Esperanto aktuell, 2009/3; Esperanto en Azio, 2009/63; Esperanto sub la Suda Kruco, 2009/98; Esperanto, 2009/7-8; Femina, 2009/18; Folioj de KAT-Amikaro 2007/46-47-2008/48-49; Ĝenerala Informilo, 2009/156; Heroldo de Esperanto, 2009/7,8; KAE-Informilo, 2009/67; Kataluna Esperantisto, 2009/350; Komencanto, 2009/2; Kontakto, 2009/1; La Brita Esperantisto, 2009/966; La Gazeto, 2009/143; La Movado, 2009/700,701; La Ondo de Esperanto, 2009/7; La Revuo Orienta, 2009/5,6; La Sago, 2009/56; Literatura Foiro, 2009/239; Litova Stelo, 2009/3; Monato, 2009/7,8-9; REGo, 2009/3; Sennacieca Revuo, 2009; Sennaciulo, 2009/7-8; Spiegulo, 2009/3; Usona Esperantisto,

La muzika merkato kreskas

Dum la pasintaj 40 jaroj eldoniĝis almenaŭ 270 muzikalbumoj kun Esperanto-kantado. La statistiko montras daŭran kreskon: En la sesdekaj jaroj aperis almenaŭ 4 albumoj, el la sepdekaj ni scias pri 17, en la okdekaj estis minimume 58, el la naŭdekaj troveblis 75 kaj en la unua jardeko de la 21a jarcento ĝis decembro 2007 certe eldoniĝis 105 muzikaj albumoj (dum ok jaroj). Alimaniere dirite ekde 1977 ĉiujare eldoniĝis almenaŭ unu Esperanto-albumo, ekde 1987 minimume kvar jare, ekde 1996 ĉiujare estis ok aŭ pli.

La maksimumon oni atingis en la jaro 2001, kiam aperis escepte multaj, nome 27 albumoj. Laŭ la kvanto sekvas 2004 kun 16 albumoj kaj 2000 kun 14. Ekde tiam okazis ioma malkresko al ĉ. 8 albumoj jare: plej verŝajne tio estis sekvo de la pli vasta uzado de mp3-formataj dosieroj.

La eldonado bele montras la kreskon de Esperantujo dum tiuj jardekoj — jardekoj kun pli kaj pli grandaj kaj multaj junularaj kaj eksjunularaj renkontiĝoj, kun pli da denaskuloj kaj aranĝoj por ili, pli da Esperanto-aktivado ekster Eŭropo, pli da scienca literaturo kaj, en la pasintaj jaroj, bela prezentiĝo de Esperanto en la interreto.

“Kvanto jes, sed kie la kvalito?” — oni povas kelkfoje aŭdi. Fakte la kvalito ofte venas kun la kvanto, ankaŭ ĉi-kaze. Certe plu eldoniĝas mezqualita muziko (kaj ĉiam tiel estos), sed iusence tiu necesas por havi ankaŭ bonajn diskojn. Ju pli granda la merkato entute, des pli interesa ankaŭ por muzikistoj, regas iom da konkurenco kaj kelkaj streĉas sin por povi prezenti ion elstaran.

La liston de la preskaŭ 300 muzikalbumoj mi metis al vikipedio (<http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-muzikalbumoj>); aliaj korektis kaj aldonis. Ĉe kelkaj titoloj plu mankas iuj indikoj, aliaj titoloj eble entute mankas. La vikipedio kaj ĉiu uzanto ĝojos pri via aldonado.

Lu Wunsch-Rolshoven

Legu en la sekva “Ondo”:

- ☆ Instruistoj kunvenis en Krakovo
- ☆ Konferenco de OSIEK
- ☆ Sergio Pokrovskij pri *Komputeko*
- ☆ Historio de la Sukcena Lando
- ☆ *Rusa Antologio*

La oktobra *Ondo* aperos tiel, ke oni povu ricevi ĝin en Arkones. Se vi planas veni, informu nin.

Por la maja-junia *Sudoku* venis 19 respondoj. Ĉiuj respondoj estas tute ĝustaj! Ilin sendis: Karine Arakeljan (Armenio), Anne George, Edmund Grimley Evans, Jones Malcolm (Britio), E Henning Olsen (Danlando), Erkki Kemppainen, Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Nora Caragea, Hans-Burkhard Dietterle, Horst Vogt (Germanio), Jadwiga Benicka, Mirosława Kubicka, Hanna Skalska, Zbigniew Tyłkowski (Pollando), Jovan Nikolić (Serbio), Birgitta Anvelik, Roland Larsson (Svedio), Jurij Kivaev (Ruslando). La loto donis libropremion al **Roland Larsson**. Ni gratulas. lin! La solvon vidu ĉi-sube.

7	9	2	5	6	1	4	3	8
3	5	1	4	2	8	7	9	6
6	8	4	7	3	9	1	5	2
9	6	7	2	5	4	3	8	1
2	1	3	8	9	6	5	4	7
8	4	5	1	7	3	6	2	9
1	3	9	6	8	5	2	7	4
5	2	6	9	4	7	8	1	3
4	7	8	3	1	2	9	6	5


Araneaĵo

Ĉiuj vortoj havas 5 literojn kaj finiĝas per *-o*. Vi tralegos en unu el la vicoj (laŭ la horloĝa turndirekto) proverbon, se vi ĝuste enskribos ĉiujn vortojn.

1. Arkta remaĉanta mamulo portanta kornojn; 2. Monunujo de Ruslando; 3. Sekiĝanta maro en Centra Azio; 4. Kompletaj foresto de materio; 5. Long-orela ŝarĝbesto; 6. = Ŝatokupo; 7. Ĉefurbo de Kanado; 8. Planedo inter Tero kaj Jupitero; 9. Oni elpafas ĝin per kanono. 10. Brulebla gaso C₂H₆; 11. Nobla gaso; 12. disponebla kvanto da varoj, krudmaterialoj aŭ fabrikitaĵoj (tenata en provizejo); 13. Loĝanto de sudeŭropa duoninsulo; 14. La regiono ĉirkaŭ la norda poluso; 15. Muziknota kromsigno, kiu montras altigon de tono; 16. Muzika kanta teatraĵo; 17. Ligna dukapa martelo; 18. La lasta grafemo de la greka alfabeto.

La respondo (proverbo) venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 10a de oktobro 2009.

Kompilis Viktor Alikin



Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Migrenado ĉirkaŭ la morto

Migreno <...> kvankam ne estas adekvata al la mortado, tamen ĝi estas la kaŭzo de la granda laborforesto. (*Fakaj studoj en Esperanto*. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2003, p. 104; diagnozis Edmond Brent, kuracis Ionel Oneț)

Inaŭguro dum morto, aŭ la zombia UK

[Dum la malfermo de la Bjalistoka UK] la kongresanoj emocie konsciis <...> ke la historia momento ĉizeliĝos en ilia memoro ĝisvive. (G. C. Fighiera, *Kongresa kuriero*, 2009, №3, p. 1)

La floroj de l' malbono?

... Esperanto ne nur mortis, ĝi floradas je pluraj niveloj. (Dennis Keefe, <http://www.liberafolio.org/2009/bjalistoko4a>, stato 11 aŭg 2009)

Ĉu nova sciencobranĉo?

Kunveno de IKEK en Bialistoko okaze de la UK de UEA (aldonaĵo al *Internaciisto*, 1996, №2; trovis Ionel Oneț)

Ĉu la infana?

Ĝis kiam ne estas klaraj motivoj de la vandalo ne indas la okazon taksi kiel ago kontraŭ zamenhofa raso. (Peeter Aitai, <http://www.liberafolio.org/2009/bjalistoko8a/#1249983140>, 3 aŭg 2009)

Sekompare interesa ikuablo

[en] ampleksa ekspozicio... oni povis trovi la unuan lernolibron de Zamehof... (Ileana Schroeder, *Esperanto*, 2008, №11, p. 225)

Staras meze de la vojo

En la historio de Esperanto, ne nur landnivele, la personeco de Ivo Lapenna estas neevitebla kolono. (*Zagreba Esperantisto*, 2007, №1, p. 9)

Freŝbakitoj

Retpanejo de monato.net kaj retbutiko.net (Temo de mesaĝo dissendita de la Retbutiko de Flandra E-Ligo, 3 jun 2009; indikis Kalle Kniivilä)

Longa memtolero

Dum multaj jaroj U[rugvaja] E[speranto]-S[ocieto] eltenis sin danke al malmultaj homoj, ĉefe S-roj Alberto Barrocas y Arisbel Luberto. (Daniel Bebelacqua, <http://www.ameriko.org/eo/node/402>)

Plukis István Ertl

Juda humuro

Telegramo

Maks Goldberg trovis sian edzinon en la lito kun Jozef Blum. Hazarde li renkontas Joŝuan Silverstein.

— Kio okazis al vi, Maks? Kial vi aspektas tiel ĉagrenita?
— Kiel mi ne estu? Mi iris al la granda urbo por unu semajno. De tie mi telegrafis al mia edzino: "Mi alvenos hejmen ĉi-vespere". Kaj vespere, kiam mi alvenis hejmen, mi trovis la edzinon en la lito kun Jozef Blum! Ĉu vi povas imagi tian senhontaĵon? Mi divorcos!

— Maks, ne faru tion! Eble via edzino havas ekskuzon.
— Kiun?
— Eble ŝi ne ricevis la telegramon.

El la kolekto de Josi Shemer

Instruista trejnado en Poznano

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI denove kune organizas unujaran instruistan trejnadon, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua okazos 12–18 sep 2009, la dua 30 jan – 5 feb 2010) kaj intertempan hejman laboradon, retan konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2010. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

Kondiĉoj: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

Partoprenkotizo: A-landoj: 360 eŭroj, B-landoj: 130 eŭroj por unu semestro.

El la Programo

Lingvopedagogio (Katalin Kováts, Maria Majerczak, Zsófia Kóródy, Ilona Koutny): Bazaj faktoroj de lingvopedagogio / Esperanta metodiko / Instruhelpiloj.


Esperanta kulturo (Tomasz Chmielik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Ilona Koutny): Plej gravaj eventoj de la historio de esperanto / Ĉefaj periodoj kaj verkistoj de E-literaturo / Tiklaj punktoj de E-gramatiko.

Lingva trejnado (per testoj).

Donaco: partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj.

Informo kaj aliĝo: interlin@amu.edu.pl

Ilona Koutny



Germanio. Esperanto videbliĝas ne nur en la Esperanto-urbo Herzberg, sed ankaŭ en tiuj apudaj vilaĝoj, kiuj havas turisman valoron. Antaŭnelonge estis inaŭguritaj bonvenigaj tabuloj en Scharzfeld (vilaĝo kun la Unukornula Groto) kaj Lonau (vilaĝo en la nacia parko Harz), kiu estas sur la supra foto. (ICH)



Ĉeĥio. La 65a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Liberec (vd. p. 5) celis ne nur esperantistojn. En la ĉefplaco de la urbo okazis lingva festivalo, en kiu esperantistoj el dekoj da landoj diversmaniere prezentis la lingvon, kulturon, vestaĵojn kaj gastronomion de siaj popoloj. (Ho-young Song)



Serbio. La 31a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj okazis ĉi-aŭguste en Mali Iĝoš (Serbio) kun 78 partoprenantoj el Belgio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Kroatio, Nederlando, Norvegio, Rusio, Svedio, Svislando, Urugvajo kaj Serbio. Sur la foto: Kelkaj REFanoj en prelego. (Dimitrije Janičić)



JORGE LUIS BORGES
La sekreta miraklo

Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 16
 200 paĝoj, 18 eŭroj



Jules Verne


Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj

Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 15
 208 paĝoj, 20 eŭroj



István Nemere
**Serpentoj
 en la puto**

István Nemere. *Serpentoj en la puto*
 Originala romano pri terorismo
 184 paĝoj, 18 eŭroj



Georges Simenon

**Maigret
 eraras**

Serio "Mondliteraturo", No 17

Georges Simenon. *Maigret eraras*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 17
 128 paĝoj, 12 eŭroj.